

## Radikoj kaj vortoj en esperanto\*

Wim JANSEN

## Enhavo

1. Enkonduko	10
2. Parolpartaj sistemoj	12
3. La esperantaj parolpartoj en historia perspektivo	16
4. Priskribo de la parolpartoj laŭ FDG	20
5. Konkludoj	37
Bibliografio	42

**Resumo.** Tiu ĉi studo traktas la parolpartan sistemon de esperanto sur la niveloj de la semantike difinitaj radikoj kaj de iliaj sintaksaj vortigoj. Dum pli ol jarcento tiu ĉi temo, konata kiel la demando pri la (sen)kategorieco de la radikoj, estas kontroversa inter gramatikistoj. Aplikante la teorion kadron de la Funkcia Diskurs-Gramatiko, la aŭtoro refutas la Akademian pozicion favore al tri-membra kategoria radikaro (verba, substantiva kaj adjektiva-adverba) kaj kontraŭproponas bazan sistemon de senkategoriaj aŭ flekseblaj radikoj kun subsistemo de radikoj kun verba-neverba disspecialiĝo. La evoluon de la lingvo markas kreskanta uzado de radikoj en senperaj verbigoj, kies vortsignifoj konsiderinde kaj neantaŭdireble preteras sian funkcia pravigon. Radiko montranta tiun fenomenon estas priskribebla kiel origine fleksebla radiko, splitiĝinta en du heterosemajn, el kiuj unu specialigis por verba aplikado. Kvankam la hipotezata evoluado de fleksebla aŭ senkategoria al miksitaj parolpartaj sistemoj perturbas la senperan rilaton inter la semantiko kaj la sintakso de esperanto kaj malfavore influas la lernfacilecon de la lingvo, la verba-neverba dikotomeco kiel la unua paŝo al nefleksebligo respegulas demonstreble naturan procezon inter etnaj lingvoj.

**Abstract.** *Roots and words in Esperanto.*

For more than a century, the nature of the parts-of-speech (PoS) system of Esperanto has been an item of controversy among its grammarians. Based on a study of the language as it is actually used by its speech community and supported by historical and contemporary documents, the author argues that the language's current PoS system can be described adequately as a mixture of contentive lexemes and verbally specialized lexemes. A system of contentive lexemes, which allows the user to create four different words with predictable meanings out of each single root of any semantic category without having to use derivational tools, does justice to the learnability claim which

---

\*Multan dankon mi ŝuldas al Michel Duc Goninaz, kiu tra legis antaŭan version de tiu ĉi artikolo, al tri anonimaj provlegantoj, kiuj sagace komentis la manuskripton, kaj al Kees Hengeveld de la Universitato de Amsterdamo, kun kiu mi diskutis ĝian anglalingvan version.

underlies the structure of this language, which was made to be easy. The increasing number of verbally specialized lexemes is a development which is known to, but unsatisfactorily explained by, many esperantologists. The paper develops the hypothesis that the diachrony of Esperanto (constructed in its origin, but freely developing) provides support to the claim that natural languages can be classified in terms of an implicational hierarchy of their PoS systems, in which verbal specialization precedes all other forms of syntactic specialization of lexemes. The analysis is done within the framework of functional discourse grammar. enkonduka frazo (por

## Mallongigoj

Majusklete en la glosoj.

Adj	ADJ	adjektivo	N	N	substantivo (nomo)
Adv	ADV	adverbo	NeV	NEV	neverbo
Akt	AKT	aktiva	Pas	PAS	pasiva
Art	ART	artikolo	Pl	PL	pluralo
As	AS	asocia	Prd	PRD	predikta
Imp	IMP	imperfekta	Prep	PREP	prepozicio
K	K	kapo	Prf	PRF	perfekta
Kop	KOP	kopulo	Prz	PRZ	prezenco
M	M	modifanto	Ref	REF	referenca
MAdv	MADV	maniera adverbo	V	V	verbo

## 1. Enkonduko

“Jam la naŭan jaron instruante la sisteman gramatikon en la universitato ĉiufoje ĉe tiu ĉapitro mi renkontas la dubon kaj nekredemon de miaj studentoj” skribis István Szerdahelyi (1974:16) pri la ĉapitro koncerne la gramatikan karakteron de la radikoj. Kun kiom da simpatio mi relegas tiun suspiron, mem instruante la esperantan gramatikon al universitataj studentoj pri lingvoj kaj lingvistiko de nuraj kvin jaroj, sed spertante ĝuste tion saman! Inspirite de la hungara majstro, mi traktos en tiu ĉi artikolo la temon de la kategorieco aŭ senkategorieco (laŭ la tradicia esperantologia terminologio) de la esperantaj vortradikoj. La nova perspektivo de tiu ĉi studo konsistas en tio ke ĝi deiras de moderna ĝenerallingvistika teoria kadro kaj serĉas aplikon de ties analizometodoj en la parolparta sistemo de iu objektlingvo, por kiu mi elektis esperanton. La teoria kadro en kiu mi proponas la studon, estas tiu de la Funkcia Diskurs-Gramatiko (*Functional Discourse Grammar* aŭ FDG).<sup>1</sup> FDG estas teorio pri la gramatiko de la homa lingvo, publikigita en Hengeveld

<sup>1</sup>*Diskurso* estas uzata ĉi tie ne laŭ NPIV (2002:245), sed kun la signifo de kohera teksto (parola, skriba aŭ gesta) kiu reprezentas sencohavan komunikon kaj kies amplekso povas iri de unu vorto ĝis tuta frazaro.

& Mackenzie (2008)<sup>2</sup> kaj estas pluevoluigo de la funkcia gramatiko, kiun el-laboris la lingvisto Simon Dik (1997).<sup>3</sup>

En multaj lingvoj ekzistas gramatikaj fenomenoj kiuj ne estas klarigeblaj sur la nivelo de izolitaj unuopaj frazoj (*clauses*), ekzemple en la raktostrukturo de sinsekvaj eventoj. Ili dependas de lingvospecifaj gramatikaj reguloj kiuj regas interligojn sur pli alta nivelo. Sekve, la analizobazo en FDG ne estas la frazo, sed la diskursago (*discourse act*), kiu povas, sed ne devas, esti identa al frazo. En certaj cirkonstancoj la diskursago povas ampleksi pli ol frazon. Inverse ĝi povas konsisti el ne pli ol unusola vorto, kiun FDG konsideras kompleta, nereduktita esprimo, kondiĉe ke la komunika intenco estas derivebla el la diskurso. Ene de diskursagoj oni distingas la alskriban subagon (*subact of ascription*), kiu estas uzata por elvoki proprajon (alskribi semantikan kategorion) kaj la referencan subagon (*subact of reference*), kiu estas uzata por referenci al jam konata propraĵo (referenci al konata semantika kategorio).

FDG distingas kvar analizonivelojn. Ili nomiĝas la interpersona (*interpersonal*) aŭ pragmatika, la semantika, la morfosintaksa kaj la fonologia niveloj; ili estas lingvospecifaj. La pragmatika-semantika priskribo de iu lingvo laŭ FDG rekonas nur tiujn funkciojn kaj signifojn kiujn la koncerna lingvo efektive kaj sisteme kodigas en siajn morfosintakson kaj fonologion. FDG do ne antaŭsupozas la ekziston de universalaj pragmatikaj kaj semantikaj nocioj. Fidela je sia nomo, FDG ne estas form-orientita, sed funkci-orientita lingvoteorio.

En ĉapitro 2 mi priskribos la konstruon de parolpartaj sistemoj laŭ FDG kaj aplikon de tio al esperanto. El tio klare sekvos la kerno de la kontroverso inter la kategoria kaj senkategoria aliroj en la esperantologia literaturo. En ĉapitro 3 mi donos tre resuman historian trarigardon de la kompreno pri kaj uzado de la esperantaj parolpartoj. Tiuloke mi ankaŭ priargumentos ke la kategoria sistemo subtenata de la Akademio de Esperanto (AdE) estas malaprobinda. La sekcioj 4.1 kaj 4.2 traktos la nuntempe observeblan parolpartan sistemon de esperanto laŭ FDG; en sekcio 4.3, bildige ĉefe en la figuro 2 (paĝo 36) kaj en la tabeloj 17 kaj 18, mi resumos la rezultojn de la analizoj kiuj kondukis al la konkludo pri la nuntempa parolparta sistemo de esperanto. En ĉapitro 5 mi pridiskutos la konkludojn kaj aldonos hipotezon pri la diakrona evoluo de la parolparta sistemo.

---

<sup>2</sup>Ĝis nun la FDG-koncerna terminologio ekzistas nur en la angla. Tial unu el la serĉataj kromefikoj de tiu ĉi artikolo estas diskonigi kaj diskutigi mian esperantan version de tiuj terminoj kiuj estas bezonataj ĉi tie. Al multaj proponataj terminoj mi aldonos la anglan originalon inter krampoj.

<sup>3</sup>Vidu ankaŭ [www.functionalgrammar.com](http://www.functionalgrammar.com) (lasta reviziodato 2009-10-13).

## 2. Parolpartaj sistemoj

Konciza, sed bona resumo pri la apliko de FDG por priskribi la sistemon de la parolpartoj en iu lingvo estas konsultebla en Hengeveld & Mackenzie (2008:218–228). En tiu ĉi ĉapitro mi elstarigos la esencajn elementojn de tiu metodo. Konceptante sur la interpersona aŭ pragmatika nivelo sian komunikantan intencon, parolanto povas konsistigi sian diskursagon el subagoj, kiuj formuliĝas semantike kiel leksemgrupoj kun po unu nemalhavebla elemento, la kapo (*head*), akompanata de unu aŭ pli da malhaveblaj elementoj aŭ modifantoj (*modifiers*).<sup>4</sup> Alskriba subago formuliĝas semantike kiel predikata sintagmo (*predicate phrase*), dum referenca subago formuliĝas kiel referenca sintagmo (*referential phrase*). En la sintakso reaperas tiuj sintagmoj en kiuj la leksemoj laŭbezone adaptiĝis al la sintaksa rolo al kiu ili estis destinitaj. La ĉi-suba tabelo 1 montras la kvar sintaksajn poziciojn kiujn leksemoj povas okupi kiel vortoj.

Leksemo okupanta iun el la kvar ŝlosilaj pozicioj povas esti pli aŭ malpli specialiĝinta por tiu rolo. Lingvo en kiu ĉiu el la kvar pozicioj estas okupebla nur de leksemoj destinitaj al la koncerna rolo posedas sur la semantika nivelo la teorie maksimume specialiĝintan parolpartan sistemon. Laŭ sia sintaksa apliko tiuj leksemoj nomiĝas laŭvice verboj (V), substantivoj (N), manieraj adverboj (MAdv) kaj adjektivoj (Adj).

Tabelo 1. Leksemdistribuo laŭ sintaksaj pozicioj

	Kapo	Modifanto
Predikata sintagmo	V	MAdv
Referenca sintagmo	N	Adj

V estas leksemo kiu estas uzebla *nur* kiel kapo de predikata sintagmo. N estas uzebla kiel kapo de referenca sintagmo, MAdv kiel maniera modifanto en predikata sintagmo kaj Adj kiel modifanto en referenca sintagmo. Tiu ĉi difino ebligas la uzon de N, MAdv kaj Adj kiel kapoj en predikataj sintagmoj dank’ al la asisto de kopulo. Tia permeso estas grava por povi priskribi multajn lingvojn. Antaŭ ol transiri al esperanto, mi ilustru la okupon de la kvar sintaksaj pozicioj per ekzemplo en la angla lingvo:<sup>5</sup>

<sup>4</sup>Kapoj kaj modifantoj en la semantiko kaj frazosintakso estas kompareblaj kun respektive la ĉefelementoj kaj flankelementoj ene de kunmetita vorto, laŭ la terminologio de Kalocsay & Waringhien (1980:392).

<sup>5</sup>La glosoj estas strukturitaj laŭ la normoj de la *Leipzig Glossing Rules* (2008), kun sigloj adaptitaj al esperanto.

- (1) *The new student speak-s beautiful-ly.*  
 La nov-a student-o parol-as bel-e  
 ART NOV-ADJ student-N parol-PRZ bel-ADV  
 ‘La nova studento parolas bele.’

En la angla aperas distingebla leksemklaso por tri el la kvar pozicioj. La leksemo *new*, kiu sintakse vortiĝas kiel *new*, estas uzata kiel modifanto en la referenca sintagmo *new student*. La leksemo *student*, kiu vortiĝas idente kiel *student*, estas uzata kiel kapo de la sama sintagmo. La leksemo *speak* estas uzebla nur kiel kapo de predikata sintagmo, ĉi tie *speaks beautifully*, kaj vortiĝas en tiu ĉi kunteksto kun alkroĉita fleksiaĵo *-s*, kiu markas la trian personon singularan en la prezenco, sen aldoni ion ajn al la semantika enhavo. La leksemo *beautiful*, kiu sintakse vortiĝas kiel *beautifully*, estas uzata kiel modifanto en la sama predikata sintagmo kaj bezonas en tiu rolo la fleksiaĵon *-ly*, kiu ne tuŝas ĝian semantikan enhavon. En la angla vastan subklason de leksemoj uzataj kiel adjektivoj karakterizas produktiva procezo de adverbigo per la aldono de *-ly*, sed alia subklaso uzas (ne ĉiam devige) ekzakte la saman formon tiel en adverbaj kiel en adjektivaj aplikoj (ekzemple *loud* en *a loud noise* ‘laŭta bruo’ kaj *to speak loud(ly)* ‘paroli laŭte’). En maloftaj okazoj ni renkontas du komplete malsamajn formojn, kiel *good* en *a good wine* ‘bona vino’ kaj *well* en *to speak well* ‘paroli bone’. Ŝajnas pravigebla la konkludo ke la angla posedas specialiĝintajn leksemojn V por plenumi la funkcion de kapo de predikata sintagmo, kaj N por plenumi la funkcion de kapo de referenca sintagmo, sed ke ĝi uzas unu modifantan leksemon M tiel por la adverba kiel por la adjektiva pozicioj.<sup>6</sup>

Se ni volas eltrovi kiel esperanto funkcias ĉi-kampe, ni rigardu la esperantan gloson en (1). Kiel konvenan elirpunkton ni prenu la radikon *parol-*<sup>7</sup> (*speak*) kaj observu en tabelo 2 kiel ĝi povas manifestiĝi en la kvar ŝlosilaj sintaksaj pozicioj:<sup>8</sup>

<sup>6</sup>La klasifikeblo de la angla leksemsistemo kiel tri-membra estas klare ĉerpebla el Hengeveld & Mackenzie (2008:229), laŭ kiu *-ly* estas nomebla vortklasa ŝaltilo sen semantikaj konsekvencoj. En antaŭaj publikigoj (ekzemple Hengeveld k.a. 2004), la distingo inter leksemklasoj kaj vortklasoj estis malpli klara.

<sup>7</sup>En la morfologio de esperanto, leksemoj estas reprezentataj de aglutine kombineblaj leksikaj morfem(ar)oj. Por simpla, nereduktebla leksika morfemo mi uzas la terminon *radiko*, ekzemple *pord-*. Por dismembrigebla leksika morfemaro mi uzas la terminon *stamo*, ekzemple la derivita *pord-et-* kaj la kunmetita *dom-pord-*. Radiko aŭ stamo estas kompletigita de streketo, kiel en *pord-*, kiu simbolas la tiuloke aldonendan fleksiaĵon, kiu markas la celatan el la kvar sintaksaj pozicioj. Du sinsekvajn komponantojn de stamo disigas iom altigita punkto, kiel en *pord-et-* kaj *dom-pord-*.

<sup>8</sup>La ekzemploj kun *parolo* kaj *parola* estas laŭvorte transprenitaj el NPIV (2002:842); tiu de *parole* kun minimuma koncizigo. La ekzemplo de *parolas* apartenas al la kompetenteco de ĉiu esperanto-parolanto.

Tabelo 2. La radiko *parol-* en siaj kvar sintaksaj pozicioj

V	N	Adj	MAdv	Ekzempla frazo aŭ sintagmo
parol-as				La studento parolas
	parol-o			Parolo estas arĝento
		parol-a		Parola ordono
			parol-e	Parole kontrakti

Por ke ĝi povu funkcii en la diversaj pozicioj, la radiko *parol-* bezonas la alkröcon nur de tiu fleksiaĵo kiu karakterizas la koncernan funkcion. Temas laŭvice pri la prezenca tensmarkilo *-as*, kiu akompanas la kapon de predikata sintagmo; la substantivmarkilo *-o*, kiu akompanas la kapon de referenca sintagmo, difinante ĝiajn singularan nombron kaj neakuzativan kazon; la adjektivmarkilo *-a*, kiu akompanas la modifanton en referenca sintagmo en nombra kaj kaza akordo kun ties kapo; la adverbomarkilo *-e*, kiu akompanas la nevarian modifanton en predikata sintagmo.<sup>9</sup> El la principe svaga signifo de la radiko *parol-* deriviĝas la vortsignifoj nur surbaze de la funkciaj postuloj de ĉiu sintaksa pozicio. *Svaga* aŭ *subdeterminita leksemo* estas difinita laŭ Ravin & Leacock (2002:2–3) kiel leksemo kun ĝenerala signifo, kovranta la diversajn specifajn (sintaksajn) manifestiĝojn. Ekzemplo en esperanto estas la radiko *infan-*, kiu povas referenci tiel al maskla, kiel al femala ido. Laŭ Hengeveld k.a. (2004:540) kaj, pli ellaborite, Hengeveld & Rijkhoff (2005:414–415) svaga leksemo entenas ĉiujn signiferojn kiuj povas esti bezonataj, por ke ĝi povu vortiĝi en iu el la kvar pozicioj. La elekto fare de esperanto-parolanto aŭ esperanto-skribanto, de tiu aŭ alia sintaksa apliko, morfologie markota de iu el la konataj fleksiaĵoj (vortfinaĵoj), aktivigos tiujn signiferojn kiuj apartenas al la celata apliko. Tiel, la signifo de la vorto *parolo* estas niacele provizore egaligebla al la pli ekspansia formo *parolado* (angle *the speaking*, ĉi tie *speech*), tiu de *parola* al la pli ekspansia (*el*)*parolata* (angle *spoken*), tiu de *parole* al la pli ekspansia *parolante* (angle *by speaking*, ĉi tie *verbally*). Se ni povus demonstri ke la elasta konduto de la ekzempla radiko *parol-* estas iel ĝeneraligebla tra la tuta leksiko, ni povus nomi la parolpartan sistemon de esperanto plene fleksebla sur la radiknivelo, t.e. sintakse nemarkita aŭ, laŭ la tradicia esperantologia nomo, senkategoria. Tian flekseblan sistemon reprezentas la linio 1 de tabelo 3 (PP-a sistemo = Parolparta sistemo):<sup>10</sup>

<sup>9</sup>Laŭ la 7-a regulo de la Gramatiko en Zamenhof (1963 [1905]) oni kreas adverbojn, alkröcante *-e* al la radiko. Ĝiaj Gramatiko kaj Universala Vortaro donas la manieran adverbon *bone* kiel ekzemplon. Ĝia Ekzercaro enhavas krome ekzemplojn de aliklasaj adverboj, kiel la lokdifina *dome* kaj la tempdifina *vespere*, kiuj ne agas sur la sintagma, sed sur la fraza nivelo.

<sup>10</sup>Tabelo 3 reproduktas la supran parton de figuro 10 en Hengeveld & Mackenzie

Tabelo 3. Leksemklasoj en diversaj parolpartaj (PP-aj) sistemoj

PP-a sistemo	Kapo de predikata sintagmo	Kapo de referenca sintagmo	Modifanto en referenca sintagmo	Modifanto en predikata sintagmo
1	Fleksebla			
2	Verba (V)	Neverba (NeV)		
3	Verba (V)	Substantiva (N)	Modifanta (M)	
4	Verba (V)	Substantiva (N)	Adjektiva (Adj)	Adverba (MAdv)

La signifo de tabelo 3 estas kaptbla per jenaj difinoj: lingvo kun unu-membra aŭ fleksebla parolparta sistemo sur la leksema nivelo posedas leksemojn kiuj estas aplikeblaj kiel verbo, substantivo, adjektivo aŭ maniera adverbo. Lingvo kun du-membra sistemo (V-NeV) posedas leksemojn kiuj estas specialiĝintaj por verba uzo, kaj aliajn kiuj estas aplikeblaj kiel substantivo, adjektivo aŭ maniera adverbo. Lingvo kun tri-membra sistemo (V-N-M) posedas leksemojn kiuj estas specialiĝintaj por verba uzo kaj aliajn kiuj estas specialiĝintaj por substantiva uzo, kune kun leksemoj kiuj estas aplikeblaj kiel adjektivo aŭ maniera adverbo. Lingvo kun kvar-membra sistemo (V-N-Adj-MAdv) posedas specialiĝintajn leksemojn por ĉiu el la kvar uzeblecoj.

La prezentmaniero de tabelo 3 fontas el implica hierarkio de parolpartaj sistemoj inter lingvoj, kiun establis Hengeveld k.a. (2004:533) surbaze de esploro de tipologie, genealogie kaj geografie reprezenta muestro de 50 tutmonde distribuitaj lingvoj. Tiu hierarkio aspektas jene:

$$(2) \quad \begin{array}{ccccccc} \text{Kapo de} & & \text{Kapo de} & & \text{Modifanto en} & & \text{Modifanto en} \\ \text{predikata} & > & \text{referenca} & > & \text{referenca} & > & \text{predikata} \\ \text{sintagmo} & & \text{sintagmo} & & \text{sintagmo} & & \text{sintagmo} \end{array}$$

Ĝi ilustras ke ju pli live en la hierarkio troviĝas sintaksa pozicio, des pli verŝajne estas ke lingvo posedas leksemklason specialiĝintan por tiu pozicio. La implica karaktero signifas ke, se iu lingvo posedas specialan leksemklason, ni diru por plenumi la funkcion de modifanto en referenca sintagmo (Adj), ĝi nepre ankaŭ posedas specialajn klasojn por plenumi la funkciojn live de ĝi, t.e. ĉi-okaze tiun de kapo de referenca sintagmo (N) kaj tiun de kapo de predikata sintagmo (V). Inverse, la minimuma nivelo de nefleksebleco estas la ekzisto de V, ĉar ja la ekzisto de speciala N, Adj aŭ MAdv implicas la nepran ekziston de plia(j) specialiĝo(j) live de ĝi. En la malsupra parto de tabelo 3 ni trovas la tri- kaj kvar-membrajn parolpartajn sistemojn kun la plej alta grado de leksem-specialiĝo (ekzemple la angla kun tri-membra sistemo sur la (2008:228).

leksema nivelo, kiel ni jam konstatis). Tri-membraĵoj estas la sistemoj kiuj ekzistas leksemnivele en la lingvoj kiujn Zamenhof denaske parolis kaj aŭdis ĉirkaŭ si, pli aŭ malpli bone regis kiel fremdlingvojn kaj prioritare uzis por krei esperanton, t.e. la rusa, jida, pola, germana, franca kaj angla. Estas grave noti ke esperanto naskiĝis en medio de tiaj parolpartaj sistemoj sur la leksema nivelo (kun vortnivela tri-membreco de la germana kaj jida, kaj kvar-membreco de la rusa, pola, franca kaj angla).

En la Unua Libro (UL) kaj en la Universala Vortaro de Fundamento de Esperanto (FdE) ĉiu radiko estas sisteme prezentata en sia verba, substantiva aŭ adjektiva traduko.<sup>11</sup> La uzo de unusolaj radikoj por krei parojn de po adjektivo kaj maniera adverbo (ekzemple *bon-* uzata por *bona* kaj *bone*), laŭ la sepa regulo de la Fundamenta gramatiko, pensigas pri tio ke la esperanta parolparta sistemo povus efektive esti respegulaĵo de la supre citita eŭropeska tri-membreco (laŭ linio 3 en tabelo 3). Aliflanke la rezonado kiu jam antaŭe kondukis al tabelo 2 povus esti indico pri tio ke eble la esperanta sistemo funkcias kiel unu-membra (fleksebla) neeŭropeska sistemo. Jen kiel resumblas iom simplige en nuksoŝelo la centjara dilemo inter la kategorieco kaj senkategorieco de la esperantaj vortradikoj, en kiun mi profundigos en la sekva ĉapitro 3.<sup>12</sup>

### 3. La esperantaj parolpartoj en historia perspektivo

La esperanta parolparta sistemo estas kontroversa minimume depost la publikigo de la verkoj de René de Saussure (1868–1943), kiu metis (semantikajn) radikojn kaj (sintaksajn) vortojn en unu poton.<sup>13</sup> En sia vortanalizo (de Saussure 1916:4) li atribuas la semantike aspektan nocion *ideo* tiel same kaj sendistinge al radikoj, kiel al leksikaj afiksoj, kiel al sintaksaj rolmarkiloj, kaj enkorpiĝas ĉiujn morfemojn de la lingvo en ian ontologian arbostrukturon, ŝajne, sed mise, implicante ke tia sistemo havas ian kognan valoron en la procezo de lernado kaj kombinado de radikoj kaj afiksoj. Laŭ tiu ĉi rezonado la radiko *frat'* (laŭ la skribmaniero de de Saussure) estus la individuigo de la superorditaj klasoj de uloj kaj substantivaĵoj, tiel ke la vorto *frat'o* (samstile citita) entenus pleonasman finaĵon. La distingo inter t.n. pleonasmaj kaj nepleonasmaj vortfinaĵoj montriĝis grava paŝo survoje al la transvalidigo de la sintaksaj vortklasoj al la semantika radiknivelo kaj sekve al la establo de kategoriaj radikoj.

<sup>11</sup>En tiu ĉi studo, citaĵoj el UL kaj FdE referencas al la germana versio Zamenhof (1968 [1887]) kaj al Zamenhof (1963 [1905]) respektive.

<sup>12</sup>Bonegan resumon de la historio donas Duc Goninaz (2009).

<sup>13</sup>La ideoj de de Saussure cirkulis ekzemple en de Saussure (1969 [1911]), (1982 [1914]) kaj (1969 [1915]), sed ĉi tie mi referencas al ilia formala resubmeto al la Akademio de Esperanto en de Saussure (1916).



En tiu ĉi kunteksto necesas ke ni haltu momenton ĉe alia mejloŝtona studrezulto de René de Saussure, nome la Principoj de Necesoj kaj Sufiĉo, kiujn la Akademio de Esperanto (AdE) transprenis en 1913 (Aktoj 2007:49). Tiuj ĉi principoj tekstas jene:

Principo de Necesoj: Por konstrui vorton kunmetitan, oni kunigas ĉiujn vortojn simplajn, kiuj estas *necesaj* por klare elvoki la ideon esprimotan de tiu kunmetita vorto.

Principo de Sufiĉo: En la vorto konstruata oni devas eviti la neutilajn pleonasmojn kaj la ideojn *fremdajn* je la ideo esprimota. (de Saussure 1916:6; la emfazoj estas originalaj)

Uzate laŭmezure, la principoj povas esti tre avantaĝaj, se oni volas atingi ekonomian kaj stile varian, elegantan lingvouzon. Sed oni estu singarda, ĉar ili estas duklinga glavo, per kiu oni povas ne nur fortranĉi balaston, sed ankaŭ mise fortranĉi vorterojn kiuj prefere restu, se oni volas esti preciza. Mi revenos al tio pli specife en la subsekcioj 4.2.2 kaj 4.2.11.

La *Plena Gramatiko* (PG), publikigita de Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien unuafoje en 1935, apogis sin i.a. sur la verkoj de de Saussure. Ĝia rekta posteulo, *Plena Analiza Gramatiko* (PAG), daŭrigis tiun jam tradician teorianton.<sup>14</sup> En sia diskuto pri la esperantaj radikoj, ankaŭ la aŭtoroj de PAG simple identigas semantikajn signifokategoriojn al sintaksaj funkcioj:


La radikojn, kiuj elvokas la nomon de ideo, oni nomas *radikoj substantivaj*; tiujn, kiuj elvokas kvaliton de ideo aŭ objekto, *radikoj adjektivaj*; tiujn, kiuj elvokas agon aŭ staton en certa tempo kaj modo, *radikoj verbaj*. La radikoj do havas aŭ substantivan aŭ adjektivan aŭ verban karakteron. (Kalocsay & Waringhien 1980:374, kun ripeto de la originala emfazo)

Sekve, en la vorto *reĝo* ili difinas la radikon *reĝ-* substantiva kaj nomas la vortklasmarkilon *-o* pleonasma (Kalocsay & Waringhien 1980:377). Plue, ili difinas la (adjektivigan) vortklasmarkilon *-a* en *reĝa* proprafunkcia, t.e. portanta iun el la signiferoj *kvalita*, *rilata* aŭ *apartena*. Tiel, do, la adjektiviga markilo, kiu en FdE (Zamenhof 1963 [1905]:139) almenaŭ laŭ sia difino estis strikte sintaksa, havas duvizaĝan rolon en PAG.<sup>15</sup> Tiu duvizaĝeco de sintaksa rolmarkilo kaj de (nevidebla) leksika kvazaŭsufikso fariĝis necesa en tiu ĉi teorio por entute ebligi la uzadon de pretendata substantivo kiel *reĝ-* en adjektiva (aŭ iu ajn nesubstantiva) pozicio laŭ la skemo de figuro 1 (venontpaĝe).

Figuro 1 klare elstarigas la miksaĵon de semantika kaj sintaksa komponantoj en la dekstra parto de la vorto, forme reprezentata de iu el la kvar

<sup>14</sup>Vidu Kalocsay & Waringhien (1935), plureferencata en la teksto ankaŭ kiel PG. Miaj tekstreferencoj al PAG estas al la antaŭlasta eldono Kalocsay & Waringhien (1980), kiu estis republikigita unu fojon, sed senŝanĝe, en 1985.

<sup>15</sup>*Reĝa* sekvas la ekzemplon *homa* sub *-a* en FdE samloke, kie *ne* estas citita iu atendebla adjektivo kiel *bela* aŭ *bona*.



Figuro 1. La esperanta vortstrukturo laŭ PAG

finajoj. La vortteorio proponita en de Saussure (1916) estis, fine, sankciita de AdE en 1967 (*Aktoj* 2007:49–51). Nuntempe la plej aktuala kaj plej aŭtoritata referencverko pri la gramatiko de esperanto estas *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG).<sup>16</sup> En la enkonduko en la principojn de vortfarado, ĝia aŭtoro klarigas sian uzon de speciala terminologio, kiu tamen ne devas kaŝi lian principan aliĝon al la pozicio de AdE (Wennergren 2005:517).<sup>17</sup> Laŭ la tuta evoluvojo de la aŭtoritataj lingvopriskriboj, kiu kondukas nin de de Saussure, tra PG kaj PAG al PMEG, kun mezvoje plantita mejloŝtono de AdE kiel apogilo, ni trovas do klasifikon de la parolparta sistemo kiel tri-membran konstruaĵon, konsistantan el sintakse specialiĝintaj radikoj verbaj, substantivaj kaj adjektivaj-adverbaj (modifaj) laŭ linio 3 en tabelo 3.<sup>18</sup>

Kiel mi rimarkigis en ĉapitro 2, ĉiuj gravaj dekomencaj kontaktlingvoj de esperanto havis (kaj havas) tri-membran parolpartan sistemon sur la leksema nivelo. Krome, la unuopaj radikoj ĉe la esperanta flanko de la vortaroj en UL kaj FdE kaj en preskaŭ ĉiu poste elirinta nova vortaro estis prezentataj kiel sintakse pretaj vortoj ĉe la flanko de la cellingvo. Facile klariĝas, do,

<sup>16</sup>Wennergren (2005). La interreta versio 14.1 de 2008-03-08 estas trovebla ĉe <http://bertilow.com/pmeg/>.

<sup>17</sup>La antaŭ nelonge publikigita *Detala Gramatiko de Esperanto* (Wennergren 2010) re-prenas la uzon de pli vaste konataj lingvistikaj terminoj.

<sup>18</sup>Mi ne pretendas kompletecon en mia listigo de reprezentantoj de la ‘oficiala’ vortteorio kaj neniel volus aserti ke mi estas ĝia unua kritikanto. Sufiĉas citi la nomojn de Duc Goninaz, Janton, Lo Jacomo kaj Szerdahelyi, kiuj aŭtoritate antaŭiris min. La pretendata nova perspektivo estas la deiro de la teoria kadro de FDG kaj la apliko de ĝiaj metodoj, el kio rezultas funkciado de la parolparta sistemo de esperanto, kiu estas adekvate priskribebla en tiu kadro kaj en nepra kontrasto kun la Akademia pozicio.

ke ekde la publikiĝo de esperanto, ĝiaj lernantoj estis logataj al *interpreto* de la vortradikoj kiel sintakse specialiĝintaj kaj ke gramatikistoj provis tion klarigi kaj fiksi teorie. Sed ĉu ankaŭ la *uzado* estis konforma al tiu interpreto? FdE proponas en sia Ekzercaro plimulton de vortoj kun (la poste tiel difinitaj) pleonasmaj finaĵoj (ekzemple pretendataj substantivaj radikoj kiel substantivaj vortoj). Sed vortoj kun t.n. proprafunkciaj finaĵoj ne mankas. Mi citu nur kelkajn: *reĝi*, *pasie*, *kuraĝas*, *nutra*, *vilaĝa*, *nomis* kaj *arĝentan* (Zamenhof 1963 [1905]:82, 83, 85, 88, 97, 99, 102). En la glosoj, cetere, ne ĉiam aperas tradukoj de ĉi lastaj formoj, sed ja de la koncernaj bazoj kun la pleonasma finaĵo. Ekzemple *vilaĝa* estas referencita en la gloso per la baza *vilaĝo*, sed *nomi* eksplicite per *nomi*, en ambaŭ okazoj kun tradukoj en kvin lingvoj (Zamenhof 1963 [1905]:97–98, 99–100).

La plimulta uzo de radikoj kaj vortoj de la sama klaso montriĝas ankaŭ el alia ol zamenhofa, didaktika verko kiel FdE, nome el la unua literatura traduko farita de lingvolerninto, Antoni Grabowski, kies esperantigo (el la rusa) de la novelo *Neĝa Blovado* de Aleksandr Puŝkin aperis malpli ol jaron kaj duonon post UL (Puŝkin 1987 [1888]). La malsupre enmetita tabelo 4 montras la nombran distribuon de la radikoj uzitaj de Grabowski por krei vortojn. La kalkulon faciligis Hauptenthal (2005), kiu ne estas studo pri la parolparta sistemo de esperanto, sed kies materialo, kompilita por priskribi kiel povus aspekti historia vortaro de esperanto, estis konvene uzebla por mia celo.

Tabelo 4. Laŭvorta distribuo de radikoj en *Neĝa Blovado*

Radiko	V	N	Adj	MAdv
‘V’	101 ‘V’-i	44 ‘V’-o	10 ‘V’-a	4 el 8 ‘V’-e
‘N’	2 ‘N’-i	135 ‘N’-o	26 ‘N’-a	2 el 8 ‘N’-e
‘Adj’	2 ‘Adj’-i	4 ‘Adj’-o	41 ‘Adj’-a	20 ‘Adj’-e
‘Adv’	—	—	—	9 ‘Adv’

La linioj en la tabelo eliras de la maldekstre starantaj radikoj, de kiuj la Universala Vortaro en FdE ŝajnigas iun sintaksan specialiĝon. Ekde ĉi tie, tiu pretendata specialiĝo estos sisteme indikata per unuopaj citiloj (tiel ke, ekzemple, ‘V’ indikas la pretendatan verban klason de iu radiko). Tiel rezultas kvar pretendataj klasoj en la maldekstra kolumno sub la koncerna kapvorto Radiko. La kapvortoj de la kvar enhavaj kolumnoj (V, N, Adj kaj MAdv) indikas vortojn de la koncerna sintaksa klaso, kiujn mi simbolas en la unuopaj ĉeloj per la bazaj fleksiaĵoj *-i*, *-o*, *-a* kaj *-e*.<sup>19</sup> Ĉiu unuopa ĉelo en la tabelo

<sup>19</sup> Atestitaj ekzemploj de vortoj markitaj per anstataŭaj aŭ aldonaj finaĵoj, kiel *-as* por

montras la nombron de malsamaj radikoj en iu el la kvar distingeblaj vort-aplikoj. Ekzemple, sur la kruciĝo de la ‘V’-linio kaj la V-kolumno ni trovas 101 malsamajn ‘V’-radikojn en verbaj aplikoj; dekstre de ĝi ni trovas 44 en substantivaj aplikoj, 10 en adjektivaj aplikoj kaj 8 en adverbaj aplikoj, el kiuj 4 estas manieraj.<sup>20</sup> La evidenta dominado de la tri unuaj ĉeloj sur la diagonalo, t.e. 101 ‘V’-i, 135 ‘N’-o kaj 41 ‘Adj-a’, kvante konfirmas la radikdistribuon en la vorttrezoro de FdE inter vortoj kun pleonasmaj kaj nepleonasmaj finaĵoj. Sed ankaŭ ĉe Grabowski aperas en ĉiuj pozicioj ne nur rektaj (ekzemple ‘V’ > V), sed ankaŭ nerektaj vortigoj, kun prefero por ‘V’-o-tipaj kaj ‘N’-a-tipaj vortoj.

La neneglektinda kvanto de nerektaj vortigoj en la supre analizita normala proza teksto ŝajnis ke la verkinto uzis la parolpartan sistemon kiel flekseblan sistemon, en kiu ĉiaj radikoj principe kvalifikiĝas por ĉiu el la kvar kandidataj vortigoj. Sed por konfirmi tiun ŝajnon altrudatan de la vortformoj, necesas ke la rezultaj vortsignifoj estu kapteblaj en ensemblo de ĝeneraligitaj kaj funkcie bazitaj reguloj. Tiu absoluta sistemeco ne tuj evidentiĝas. Ekzemple, la du ‘Adj’-bazaj verboj *rapidi* kaj *koketi* en tabelo 4 respondas al la funkcie pravigebla baza parafrazo *esti rapida/koketa* (elvoko de propraĵo), sed la du ‘N’-bazaj verboj *formi* kaj *nomi* postulas la aldonon de la sendependa signifero *don* al la semantiko de la radikoj *form-* kaj *nom-* (*nomi*, cetere, priskribiĝas tiel jam en FdE).

#### 4. Priskribo de la parolpartoj laŭ FDG

Por kontribui al solvo de la disputo pri la parolpartoj en esperanto mi hipotezas ke la sistemo estas pli fleksebla (sur la radiknivelo) ol la tri-membra sistemo subtenata de AdE. Tiun ĉi lastan mi opinias nedefendebila pro ĝia intermiksado de semantika kaj sintaksa analizoj kaj la konsekvence necesa artifiko de la t.n. pleonasmaj kaj proprafunkciaj vortfinaĵoj. Por ke ajna hipotezata nivelo de fleksebleco estu kredinda, necesas ke ĝi estu sistema tra la tuta lingvo. Necesas krome ke la signifo de ajna vortapliko de radiko estu komponebla el la svaga signifo de tiu radiko mem kaj iu specifa pliampleksigo, elvokita de la sintaksa pozicio kiun la radiko okupas en tiu apliko. La aldono de novaj semantikaj enhaveroj aŭ signiferoj estas strikte blokita en tiu ĉi modelo. La unua ŝtupo en mia analizo koncernas la difinon de tiuj semantikaj kategorioj kiuj ludas rolon en esperanto.

PRZ, *-j* por PL, estas inkluzivitaj en la nombro de la baza finaĵo de ĉiu koncernata kolumno (*-as* kiel parto de *-i*, *-oj* kiel parto de *-o* k.t.p.).

<sup>20</sup>La ĉelo en la dekstra malsupra angulo de la tabelo enhavas la naŭ liberajn morfemojn *ankaŭ*, *ankoraŭ*, *apenaŭ*, *baldaŭ*, *hierav*, *hodiaŭ*, *jam*, *preskaŭ* kaj *tuj*, kiuj ne estas manieraj adverboj kaj pro tio ne koncernas nin en tiu ĉi studo. Ili estas sintakse uzebaj senpere, t.e. sen bezono de iu finaĵo.

#### 4.1. Semantikaj kategorioj en esperanto

Deirante de Lyons (1977), Hengeveld & Mackenzie (2008:131) starigas modelon de semantikaj kategorioj por la angla, kies reuzindecon por esperanto mi proponas surbaze de la ĉi-suba tralaboro. Pli specife mi proponas la validecon de jenaj sendependaj kategorioj por esperanto (apud la angla terminologio, mi uzas interkrampe la kutimajn FDG-siglojn por la diversaj kategorioj):

**Individuaĵo** (*Individual*; x) estas ento kiu estas laŭpercepte konstanta en la tempo, lokebla en la tridimensia spaco, publike observebla kaj referencebla, kutime difinita de persono, besto aŭ objekto. Individuaĵoj ekzistas. Ekzemploj de esperantaj radikoj kiuj difinas Individuaĵon estas *hom-*, *kat-* kaj *tabl-*.

**Aferstato** (*State-of-Affairs*; e) estas ento kiu estas lokebla en la tridimensia spaco kaj en la tempo, kutime difinita de evento aŭ procezo. Aferstatoj ne ekzistas, sed okazas. Ekzemploj de esperantaj radikoj kiuj estas difineblaj kiel Aferstatoj estas *pluv-*, *panik-* kaj *spektakl-*.

**Abstraktaĵo** (*Propositional Content*; p) estas ento kiu ne estas lokebla en la tridimensia spaco kaj en la tempo kaj kiu ne estas observebla. Abstraktaĵo estas mensa konstruaĵo kaj povas esti juĝata vera aŭ malvera. Ekzemploj de esperantaj radikoj kiuj difinas Abstraktaĵon estas *ide-* kaj *koncept-*.

Aldone, Hengeveld & Mackenzie (2008:132–135) establas por la angla la ekzistorajton de la sekvantaj sendependaj semantikaj kategorioj, kies ankaŭan validecon en esperanto mi proponas surbaze de la sekvanta argumentado:

**Loko** (*Location*; l): karakterizita de radikoj kiel *lok-* kaj *kamp-*; de la specifa, produktiva lokdifina procezo, efektivigata per la sufikso *-ej-* (ekzemple *bak- > bak·ej-*);<sup>21</sup> kaj subtenata de specifa paradigmo de lokdifinaj korelativoj, finiĝantaj per *e* (*kie?* – *tie!* k.t.p.).

**Tempo** (*Time*; t): karakterizita de radikoj kiel *jar-* kaj *moment-* kaj subtenata de specifa paradigmo de tempdifinaj korelativoj, finiĝantaj per *am* (*kiam?* – *tiam!* k.t.p.).

**Maniero** (*Manner*; m): karakterizita de radikoj kiel *manier-* kaj *proces-* kaj subtenata de specifa paradigmo de manierdifinaj korelativoj, finiĝantaj per *el* (*kiel?* – *tiel!* k.t.p.).

**Kvanto** (*Quantity*; q): karakterizita de radikoj kiel *kvant-*, *nombr-* kaj *funt-* kaj subtenata de specifa paradigmo de kvantdifinaj korelativoj, finiĝantaj per *om* (*kiom?* – *tiom!* k.t.p.).

**Kialo** (*Reason*; r): karakterizita de radikoj kiel *motiv-* kaj *kaŭz-* kaj subtenata de specifa paradigmo de kialodifinaj korelativoj, finiĝantaj per *al* (*kial?* – *tial!* k.t.p.).

<sup>21</sup>En stamo mi sisteme apartigas radikojn de aliaj radikoj kaj afiksoj per iom altigita punkto (*·*). Vidu ankaŭ piednoton 7.

La adverba esprimo *telegrafe*, kiu troviĝas en ekzempla frazo en la Fundamenta Ekzercaro (Zamenhof 1963 [1905]:126), sugestas peran aŭ instrumentan, pli ol kielan aŭ manieran interpreton. Tiun ĉi supozon efektive subtenas la disvasta instrumenta interpreto de laboriloj, transportiloj kaj korpopartoj en adverbaj pozicioj: *brose* = *per broso*, *krajone* = *per krajono*, *ŝipe* = *per ŝipo*,  *piede* = *per la piedoj* k.t.p. La supozata rileveco<sup>22</sup> de **Instrumento** (ins) kiel speciala kategorio, ne postulata de Hengeveld & Mackenzie por la angla, estas plie subtenata de specifa, produktiva instrumentdifina procezo kiu estas efektivigata per la sufikso *-il* (ekzemple *tranĉ-* > *tranĉ-il-*).

Aldone al ĉiuj ĉi-supraj sendependaj semantikaj kategorioj ekzistas dependaj kategorioj kiuj ne havas senapogan ekzistorajton, sed kiuj ligiĝas al iu el la sendependaj kategorioj aŭ al la entuta situacio kiun la eldiro esprimas. Tiuj dependaj kategorioj konsistas el la **Propraĵoj** (*Properties*; f), inter kiuj mi citas (f) *bel-* kaj *vast-* (kiuj sinsekve dependas de (x) en *bela libro* kaj de (l) en *vasta kampo*), sed ankaŭ la univalentan (<sup>1</sup>f) *kur-* (kiu en *mi kuras* dependas nur de la aganto *mi*, kiu plenumas la kuradon); la duivalentan (<sup>2</sup>f) *leg-* (kiu en *mi legas libron* dependas de la aganto kaj de la priagato *libron* kiun tuŝas la legado) kaj la trivalentan (<sup>3</sup>f) *don-* (kiu en *mi donas libron al vi* dependas de la aganto, la priagato kaj de la ricevanto *vi* al kiu direktas sin la agado).

#### 4.2. La parolparta sistemo en esperanto

Reirante al tabelo 4 ni tuj vidas ke kredinda parolparta teorio por esperanto devos ampleksi minimume ĉiujn 12 procezojn, per kiuj radikoj el la tri pretendataj ‘V’-, ‘N’- kaj ‘Adj’-klasoj vortiĝas kiel verboj, substantivoj, adjektivoj kaj manieraj adverboj laŭ la praktiko de la nuntempa lingvouzo. Mi priparolos tiujn procezojn po unu ĉi-sube en la subsekcioj 4.2.1 ĝis 4.2.12, kvazaŭ mi trairus tabelon 4 linion post linio kaj ene de ĉiu linio ĉiam en la direkto de live dekstren, traktante ĉiun pretendatan radikklason kiel nuran serĉilon.<sup>23</sup> Mi listigos la semantikajn kategoriojn kiuj observeble partoprenas en la koncernaj vortigoj kaj priparolos la vortsignifojn laŭ kelkaj klarigaj ekzemploj. Laŭeble mi apogos min sur vortsignifoj ĉerpeblaj el jam cititaj aŭtoritataj verkoj kaj el Nova Plena Ilustrita Vortaro (NPIV 2002), sed okaze mi ankaŭ uzos materialon el la literaturo kaj gazetaro kaj, nelaste, mian propran intuicion.

<sup>22</sup>Kiel tradukon de la angla *relevant* mi uzas la (f)-kategorian radikon *rilev-*, el kiu sekvas sintaksaj aplikoj kiel (*ne*)*rileva*, angle (*ir*)*relevant*; (*ne*)*rileveco*, angle (*ir*)*relevance* k.s.

<sup>23</sup>Ĉu la serĉilo havas vortteorian valoron aŭ ne, estas malgrave ĉi tie. Pro sia vasta uzo en ekzemple PAG ĝi plifaciligas la atingon de laŭeble kompleta trarigardo de la manifestiĝoj de radikoj en la lingvo.

La rezultojn mi resumos en sekcio 4.3. En la tie prezentota tabelo 17 la antaŭe pretendataj radikklasoj kiuj finis sian rolon kiel serĉiloj en 4.2 ne plu aperos. Anstataŭe la linioj de la tabelo eliros de la semantikaj kategorioj de la radikoj kaj aperos iom reordigitaj por pli trafe bildigi la rezultojn.

#### 4.2.1. ‘V’-bazaj verboj

Pro ilia pretendata verbeco mi atribuas al tiuj ĉi radikoj unu el la semantikaj kategorioj <sup>1</sup>f, <sup>2</sup>f aŭ <sup>3</sup>f, ekzemple, en tiu ĉi sinsekvo, al *kur-*, *leg-*, kaj *don-*. La vortsignifoj de ‘V’-bazaj verboj estas rekte derivitaj de la nacilingvaj tradukoj de la koncernaj radikoj kiel verboj, sen plia signifospecifigo.

En tabelo 5 la simbolo + sur la kruciĝo de la (<sup>1</sup>f, <sup>2</sup>f, <sup>3</sup>f)-linio kaj la vortkolumno V markas la aplikeblon de la radiksignifo al la rezulta V.<sup>24</sup>

Tabelo 5. La semantika aspekto de la verbigo de (<sup>1</sup>f, <sup>2</sup>f, <sup>3</sup>f)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
<sup>1</sup> f, <sup>2</sup> f, <sup>3</sup> f	+				+			

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 2.

#### 4.2.2. ‘V’-bazaj substantivoj

Miaj ĉi-tie uzataj ekzemplaj <sup>1</sup>f-, <sup>2</sup>f- kaj <sup>3</sup>f-kategoriaj radikoj *kur-*, *leg-* kaj *don-* substantiviĝas kiel *kuro* (la ago), *lego* (la ago aŭ la maniero de legado) kaj *dono* (la ago kaj ties rezulto).<sup>25</sup> La okulfrapa signifodiverseco parte ligiĝas al la valento de la koncernata radiko. En la okazo de *kuro* malfacile imageblas alia interpreto ol tio kio estas plenumbla de ĝia sola aganto, nome *kurado*, t.e. la ago. Sed ĝenerale la signifo de ‘V’-baza substantivigo estas malpli precize determinebla, ankaŭ pro la semantiko de la individua radiko.

Ekzistas en la lingvo specifaj deriviloj, per kiuj oni povas substantivigi ‘V’-bazan radikon, kreante stamon kiu apartenas al la kategorio de la Aferstatoj (e) aŭ al tiu de la Individuaĵoj (x). Ekzemple, aplikante la sufikson

<sup>24</sup>Tabelo 5 kune kun la sekvantaj tabeloj 6–16 estas la unuopaj kontribuoj kiuj kune konsistigos la resuman tabelon 17 en sekcio 4.3. Por ke la bildigo de ĉiuj kontribuantaj tabeloj estu unuforma, la dua kaplinio de ĉiu el ili montras, jam de la komenco, ĉiujn semantikajn kategoriojn kaj funkciojn (p, Akt, Pas, Prf, Imp, Prd, As kaj Ref), kiuj paŝon post paŝo eniĝos kaj estos klarigataj surloke.

<sup>25</sup>Kalocsay & Waringhien (1980:388) allasas diversajn interpretojn de ‘V’-bazaj substantivigoj, nome agojn, rezultojn kaj t.n. abstraktajn konceptojn. La vortsignifojn ĉi-okaze donas NPIV (2002:639, 664, 253). La laste nomita difino ‘ago kaj ties rezulto’ (mia emfazo) por *dono* aspektas sinkontraŭdira.

-*ad* ni kreas Aferstaton: *kur-* > (e) *kur·ad-* > *kurado* (eksplicite la ago), kaj simile statas pri *legado* kaj *donado*; aplikante *-aĵ* ni kreas Individuaĵon: *leg-* > (x) *leg·aĵ-* > *legaĵo* (eksplicite tio kio estas legata), k.s. Aliflanke, mankas en la lingvo paralela procezo por krei Abstraktaĵojn (p). La rekta substantivigo povus funkcii kiel surogata (ĉar sensufiksa) metodo por tiu celo. Tiel, ekzemple de (<sup>3</sup>f) *propon-* deriviĝas la ago (e) *propon·ad-* > *proponado* kaj la rezulto (x) *propon·aĵ-* > *proponaĵo*, dum *propono* (< *propon-0-o* kun sufikso nula) estus interpretebla kiel la Abstraktaĵo.<sup>26</sup> Resume, la ‘V’-bazaj substantivoj estas subdeterminitaj koncerne sian vortsignifon, kiu estas ĉerpebla el iu el pluraj forme esprimeblaj, sed ne ĉiam esprimitaj sufiksoj (ekzemple pro rigora apliko de la Principoj de Neceso kaj Sufiĉo) aŭ el la konscia uzo de nula sufikso por esprimi Abstraktaĵon. Por la laste menciita apliko ni bezonas la signifospecifigon (p).

En tabelo 6 la simbolo ++ sur la kruciĝo de la (<sup>1</sup>f, <sup>2</sup>f, <sup>3</sup>f)-linio kaj la vortkolumno N markas la aplikeblon de (p) al la rezulta N, aldone al la radiksignifo.

Tabelo 6. La semantika aspekto de la substantivigo de (<sup>1</sup>f, <sup>2</sup>f, <sup>3</sup>f)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
<sup>1</sup> f, <sup>2</sup> f, <sup>3</sup> f	+	+				++		

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 2.

#### 4.2.3. ‘V’-bazaj adjektivoj

Por ilustrati la okazon de ‘V’-bazaj adjektivoj mi uzas la <sup>1</sup>f-kategorian radikon *viv-*, de kiu deriviĝas *viva* (*vivanta*), la <sup>2</sup>f-kategorian *parol-* kun *parola* (ekzemple *parolata*) kaj la <sup>3</sup>f-kategorian *skrib-* kun *skriba* (ekzemple *skribita*).<sup>27</sup> La plej taŭga rezulto de ‘V’-baza adjektivigo montriĝas la verba adjektivo aŭ adjektive uzata participo. Tamen, la preciza elekto de la aplikindaj dialezo kaj aspekto, ĉu aktiva (Akt), pasiva (Pas), perfekta (Prf), imperfekta (Imp) aŭ predikta (Prd), ne sekvas aŭtomate el la funkcia postulo. Kiel ĝeneraligitan signifospecifigon ni bezonas la paron Akt/Pas, el kiu elektendas

<sup>26</sup>NPIV (2002:927) havigas al ni sub *propono* la aĵon *aŭ* la agon; kontraŭe, sub *dono* (NPIV 2002:253) oni trovas (en inversa sinsekvo) la aĵon *kaj* la agon. La elekto en la unua kaj la sinkontraŭdiro en la dua okazo malfermas la vojon al pli abstrakta interpreto kiel mensa konstruaĵo, kiu ampleksas la entutan procezon de la ago ĝis ties rezulto kaj laŭbezone esprimiĝas rezulte per *-aĵ* kaj age per *-ad*.

<sup>27</sup>La ekspansiaj formoj estas laŭ NPIV (2002:1240, 842, 1054).



unu, kune kun la triopo Prf/Imp/Prd, el kiu same elektendas unu, por ke ilia kombino kun la radiksignifo donu la celatan vortsignifon.

En tabelo 7 la simbolo ++ sur la kruciĝo de la (<sup>1</sup>f, <sup>2</sup>f, <sup>3</sup>f)-linio kaj la vortkolumno Adj markas la aplikeblon al la rezulta Adj de iu diateza-aspekta kombino el la koncerna kolumno de la signifospecifigoj, aldone al la radiksignifo.

Tabelo 7. La semantika aspekto de la adjektivigo de (<sup>1</sup>f, <sup>2</sup>f, <sup>3</sup>f)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
<sup>1</sup> f, <sup>2</sup> f, <sup>3</sup> f	+		+				++	

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la ticia linio 2. Praktika alternativo montriĝas sintagmo en adjektiva pozicio, konsistanta el konvena prepozicio plus subdeterminita substantivo laŭ 4.2.2, konforme la parafrazon Prep N, se ĉi tia parafrazo donas pli naturan solvon. Tiel, la esprimo *ira bileto*, sur la bazo de (<sup>1</sup>f) *ir-*, estus konvene parafrazebla kiel *bileto por ir(ad)o* kun Prep = *por* kaj N = *iro*.

#### 4.2.4. ‘V’-bazaj adverboj

Mi reuzas la <sup>1</sup>f-kategorian radikon *viv-*, de kiu nun deriviĝas *vive* (‘vivante’), la <sup>2</sup>f-kategorian *parol-* kun *parole* (ekzemple *parolante*) kaj la <sup>3</sup>f-kategorian *skrib-* kun *skribe* (ekzemple ‘skribite’).<sup>28</sup> La plej taŭga rezulto de tiu ĉi vortigo montriĝas la verba adverbo aŭ adverbe uzata participo. Kiel en 4.2.3 la preciza elekto de la aplikindaj diatezo kaj aspekto ne tuj sekvas el la funkcia postulo. Ankaŭ ĉi tie ni bezonas kiel ĝeneraligitan signifospecifigon la paron Akt/Pas, el kiu elektendas unu, kune kun la triopo Prf/Imp/Prd, el kiu same elektendas unu, por ke ilia kombino kun la radiksignifo donu la celatan vortsignifon.

En tabelo 8 la simbolo ++ sur la kruciĝo de la (<sup>1</sup>f, <sup>2</sup>f, <sup>3</sup>f)-linio kaj la vortkolumno MAdv markas la aplikeblon al la rezulta MAdv de iu diateza-aspekta kombino el la koncerna kolumno de la signifospecifigoj, aldone al la radiksignifo.

<sup>28</sup>La ekspansiaj formoj sekvas rekte el la difinoj sub 4.2.3.

Tabelo 8. La semantika aspekto de la adverbigo de (<sup>1</sup>f, <sup>2</sup>f, <sup>3</sup>f)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
<sup>1</sup> f, <sup>2</sup> f, <sup>3</sup> f	+		+					++

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 2.

#### 4.2.5. ‘N’-bazaj substantivoj

Pro sia pretendata substantiveco, tiuj ĉi radikoj estas facile troveblaj inter la sendependaj semantikaj kategorioj (x), (e) kaj (p), sed ankaŭ inter la krome establita kategorioj (l), (t), (m), (q), (r) kaj (ins). La vortsignifoj de ‘N’-bazaj substantivoj estas rekte derivitaj de la nacilingvaj tradukoj de la koncernaj radikoj kiel substantivoj, sen plia signifospecifigo. Ekzemploj de ‘N’-bazaj substantivigoj estas (x) *hom-* > *homo*, (x) *kat-* > *kato*, (x) *tabl-* > *tablo*; (e) *pluv-* > *pluvo*, (e) *panik-* > *paniko*, *spektakl-* > *spektaklo*; (p) *ide-* > *ideo*, (p) *koncept-* > *koncepto*; (l) *kamp-* > *kampo*; (t) *jar-* > *jaro*; (m) *manier-* > *maniero*; (q) *nombr-* > *nombro*; (r) *motiv-* > *motivo*; (ins) *bros-* > *broso*.

En tabelo 9 la simbolo + sur la kruciĝo de la linio kun la kategorioj (x) k.t.p., kaj la vortkolumno N markas la aplikeblon de la koncerna radiksignifo al la rezulta N.

Tabelo 9. La semantika aspekto de la substantivigo de (x, e, p, l, t, m, q, r, ins)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
x, e, p, l, t, m, q, r, ins	+					+		

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 3.

#### 4.2.6. ‘N’-bazaj verboj

Kiel en 4.2.5 ni laŭiros ĉiujn semantikajn kategoriojn en la sinsekvo (x), (e), (p), (l), (t), (m), (q), (r) kaj (ins).

**Individuaĵoj (x).** Por radikoj de la subklaso de la homaj personoj Kalocsay & Waringhien (1980:402) mencias verbigon kiun ili difinas per ‘agi

aŭ stati kiel la substantivo' kaj kiu estas senĝene parafrazebla kiel V = Kop (kiel) N, en kiu N estas substantivo laŭ 4.2.5.<sup>29</sup> Tiu ĉi parafrazo efektive enhavas nenian kroman signifon aldone al la atribuo de semantika kategorio al iu referencaĵo. Similaj ekzemploj estas facile kontroleblaj en NPIV (2002): *tajlor-* > *tajlori*, *reĝ-* > *reĝi*, *amik-* > *amiki*, *ĉef-* > *ĉefi*, *tiran-* > *tirani* k.t.p., havantaj la bazan signifon 'esti (kiel) tajloro' k.t.p.

Inter la bestoj ni trovas plurajn similajn ekzemplojn, kio sugestas la uzoblon de la sama parafrazo, almenaŭ en tiuj okazoj en kiuj temas pri besto en firma kontakto kun homoj aŭ servanta kiel ekzemplo por iu tipa homa konduto. Mi menciuj la difinojn de *pavi* < *pav-* kaj de *simii* < *simi-* en NPIV (2002:851, 1041) kaj kelkajn literaturajn ekzemplojn kiel *momentoj* [...] *angilas* [t.e. *estas kiel angiloj*] *tra miaj fingroj* en Auld (1969:42) kaj *Oto angilis* [t.e. *estis kiel angilo*] *tra la homamaso* en Löwenstein (2008:120), ambaŭ < *angil-*.

Ankaŭ la subklaso de la senvivaj estaĵoj ene de (x) montras facilan verbigeblon, sed la rezultaj vortsignifoj estas neniel resumeblaj per la sama parafrazo kiel supre. Kvankam Kalocsay kaj Waringhien kunigas ĉi tiajn verbojn en unu solan grupon, oni bezonus tre elastan fantazion, se oni volus trovi ian semantikan komunecon inter ili. Se *akvi* < *akv-* signifas 'provizi akvon',<sup>30</sup> *lakti* < *lakt-* ne signifas 'provizi', sed 'perdi lakton'; *bordi* < *bord-* signifas 'esti bordo', sed *flami* < *flam-* ne signifas 'esti flamo', sed i.a. 'produkti flamojn'; *pendoli* < *pendol-* egalas al *svingi pendole* kaj *nesti* < *nest-* estas i.a. 'loĝi en nesto'. La vortsignifoj ne nur sisteme maltrafas la funkcie pravigeblan 'esti (kiel) N'; ili montras abundan variecon de nesistemigeblaj kromsignifoj kiuj estas rekte ligitaj al la individuaj radiksignifoj. Tamen, la literaturo malkaŝas la ekziston de verboj el senvivaj (x)-kategoriaj radikoj, kiuj ja parafrazeblas per V = Kop (kiel) N. Mi menciuj *siluetas* [t.e. *estas silueto*] *tagovrako* < *siluet-* kaj *mi ... ĝenerale ne atutas* [t.e. *estas atuto*] < *atut-* en Auld (1969:49, 52), kaj *spirito fundamentas* [t.e. *estas fundamento*] < *fundament-*, *grotas* [t.e. *estas kiel grotoj*] *la fenestroj* < *grot-*; *infero faŭkis* [t.e. *estis kiel faŭko*] el *faŭk-*; *ŝtalegriza fluo muras* [t.e. *estas kiel muro*] < *mur-*; kaj *obeliskas* [t.e. *estas kiel obelisko*] *masto* < *obelisk-* en Ragnarsson (1959:40, 51, 66, 75, 75).

**Aferstatoj (e).** Same kiel en la okazo de (x), troveblas radikoj (e)-kategoriaj kiuj allasas verbigon sen ajna aldono de kromsignifero en la rezultaj vorto preter la funkcia postulo. Ekzemploj estas: *pluv-* > *pluvi*; *neĝ-* > *neĝi* kaj simile por aliaj meteorologiaj fenomenoj. Kelkaj ekzemploj el la literaturo kiuj kongruas kun la priskribo 'esti N' estas *eĥis* [t.e. *estis eĥo*] *la babilado* <

<sup>29</sup>En tiu ĉi baza parafrazo ni do preteratentas ajnan dinamikan aspekton de la estado, al kiu aludas 'agi', sed kies *sistema* reflektiĝo en la nuntempa lingvouzo ne estas demonstrebla. Pri la valideco de la opcio de *kiel* vidu ankaŭ la ekzemplojn *gast-* kaj *patr-* en NPIV (2002:385, 849).

<sup>30</sup>NPIV (2002:66) donas ankaŭ *akv-um-i* kun la signifo de 'akv-i'.

*eĥ-* (Löwenstein 2008:543) kaj *Ĉu ni ne vigle renesancis?* < *renesanc-* en Auld (1969:108).<sup>31</sup> Aliaj verboj ja aldonas signiferojn kiuj estas rekte ligitaj al la individuaj radikoj kaj ne ĝeneraligeblaj por la tuta kategorio: *manifestaci-* > *manifestacii*, t.e. *organizi manifestacion*, *panik-* > *paniki*, t.e. *trafi per paniko*; *konkurs-* > *konkursi*, t.e. *partopreni en konkurso*.

**Abstraktaĵoj (p).** Troveblas radikoj (p)-kategoriaj kiuj allasas verbigon sen ajna aldono de kromsignifero en la rezulta vorto preter la funkcia postulo, ekzemple *fakt-* > *faktas* [t.e. *estas fakto*] *la diabla dens'*, en Ragnarsson (1959:82). Aliaj verboj ja aldonas signiferojn kiuj estas rekte ligitaj al la individuaj radikoj kaj ne ĝeneraligeblaj por la tuta kategorio: *koncept-* > *koncepti*, t.e. 'ellabori koncepton'.

**Loko (l).** Multaj radikoj (l)-kategoriaj allasas verbigon kiu tamen kelkfoje estas akompanata de konsiderinda kromsignifero preter la funkcia postulo, ekzemple *lok-* > *loki*, t.e. 'trovi lokon por iu aŭ io'. En aliaj okazoj la parafrazo *Kop (kiel) N* estas aplikebla, ekzemple en *Ĉielo maras* [t.e. *estas kiel maro*] en Ragnarsson (1959:75).

**Tempo (t).** Radikoj (t)-kategoriaj ne ŝajnas esti taŭgaj kandidatoj por sistema verbigo, kvankam troveblas la formoj *matenas* [t.e. *estas mateno*] < *maten-* kaj *vesperas* [t.e. *estas vespero*] < *vesper-* (laŭ la parafrazo *Kop (kiel) N*) jam ĉe Zamenhof (NPIV 2002:718). Bela ekzemplo el nuntempa nefikcia teksto estas *Jam junias kaj junie NGGE kutimas sciigi* (Moerbeek 2010:1), en kiu aperas en unu frazo kaj la verbigo *junias = estas junio* kaj la (tempa!) adverbigo *junie = en junio* el la radiko (t) *juni-*.

**Maniero (m).** Ekzistas nur malmultaj radikoj kiuj apartenas al la kategorio (m). La plej evidenta estas *manier-* mem, sed ankaŭ *metod-* kandidatas, kontraŭ *rimed-*, kiu ŝajnas pli klasifikinda kiel (ins). Kvankam nenio devus bari la vojon al verboj kiel *manieri* aŭ *metodi*, ilia semantiko ŝajnas malfavori tion. Provizore estas pli konvene, konsideri (m)-kategoriajn radikojn malfacile verbigeblaj.

**Kvanto (q).** Ankaŭ radikoj (q)-kategoriaj ne ŝajnas esti taŭgaj kandidatoj por sistema verbigo, kvankam troveblas ekzemple la verbo *nombr-i* < *nombr-* kun la signifo 'enteni aŭ enhavi ian sumon' (kiun oni povus pene egaligi al la funkcie postulata 'esti sumo'), sed en ĝia tria signifo 'difini la sumon' kaj 'mezuri per sumoj la kvanton de fluo' aperas ampleksaj kromsigniferoj (NPIV 2002:789).

**Kialo (r).** Radikoj (r)-kategoriaj estas maloftaj. Por esprimi la kialon, oni kutime uzas la radikon *kaŭz-*, kvankam *kaŭzo* ne estas identa al kialo. La rekta verbigo de *kaŭz-* estas *kaŭzi*, kies signifo estas kaptebla de la parafrazo

<sup>31</sup>Verdire, en la lasta okazo la parafrazo *estis renesanculoj* kun la derivita stamo (x) *renesanc-ul-* aŭ *estis renesancaj* estus pli konvena, sed ĉiukaze temas pri rekta atribuo de semantika kategorio al la referencaĵo en la koncerna esprimo laŭ la celata senco de la aŭtoro.

Kop N, t.e. *esti (la) kaŭzo*. Apud la ne plene kontentiga *kaŭz-* ankaŭ uziĝas *motiv-*, kies verbigo *motivi*, tamen, ne signifas ‘esti (la) motivo’, sed ‘prezenti motivojn’.

**Instrumento (ins).** La (ins)-kategoriaj radikoj troveblas inter la laboriloj kaj korpaj partoj en Kalocsay & Waringhien (1980:402), kiujn la aŭtoroj deklaras verbigeblaj kun unusola vortsignifo ‘plenumi agon per N’. Citataj estas ekzemploj de iloj kiel *martel-* > *marteli*, *bros-* > *brosi*, *fork-* > *forki*, *ankr-* > *ankri* kaj multaj aliaj. Ekzemploj de korpopartoj uzataj kiel iloj estas *bek-* > *beki* kaj *kubut-* > *kubuti*, de kiu ni trovas freŝdatan literaturan ilustraĵon en *la klientoj komencis kubuti* [forpuŝi per la kubutoj] *unu la alian* (Löwenstein 2008:121). Malgraŭ la ŝajno de ĝeneraligebla tutkategoria rilatigo de radiksignifoj al vortsignifoj, la specifigo ‘plenumi agon per N’ enhavas semantikan komponanton preter la funkcia postulo kaj ne klarigas la diferencon inter *frapi per martelo*, *froti per broso*, *ĵeti ankron*, *piki per beko*, *forpuŝi per la kubutoj* k.t.p.

La verbigo de ‘N’-bazaj radikoj estas resumebla jene. Unue, multaj verbigoj de (x)-, (e)-, (p)-, (l)-, (t)-, (q)-, kaj (r)-kategoriaj radikoj obeas la funkcie pravigeblan egalaĵon  $V = \text{Kop (kiel) N}$ , sen plia signifospecifigo.

En tabelo 10 la simbolo + sur la kruciĝo de la linio 1 kaj la vortkolumno V markas ĝian aplikeblon al la rezulta V.

Due, aliaj verbigoj de (x)-, (e)-, (p)-, (l)-, (q)-, kaj (r)-kategoriaj radikoj montras aldonan enhavon kun kromsignifero, kiu lezas la supran egalaĵon. La du radikgrupoj ne formas subklasojn kiuj ekskludas sin reciproke, sed povas teorie verbiĝi jen tiel, jen tiel ĉi. Krome, (ins)-kategoriaj radikoj ŝajne neniam verbiĝas laŭ la skemo  $V = \text{Kop (kiel) N}$ , sed sisteme kiel perinstrumenta ago kun semantika plusvaloro, en kiu la koncerna ago varias laŭ la individua radiko.

En tabelo 10 la simbolo +', kiu enhavas la semantikan pluvaloron ('), sur la kruciĝo de la linio 2 kaj la vortkolumno V markas ĝian aplikeblon al la rezulta V.

Fine, (m)-kategoriaj radikoj ŝajnas rifuzi verbigon, kvankam teorie ĝi estus ebla laŭ la funkcia egalaĵo  $V = \text{Kop (kiel) N}$ . En tabelo 10 streketo sur la kruciĝo de la linio 3 kaj la vortkolumno V markas tiun ĉi situacion.

Tabelo 10. La semantika aspekto de la verbigo de  
(x, e, p, l, t, m, q, r, ins)-radikoj

	Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
	Kategorio	Radik- signifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
1	x, e, p, l, t, q, r, ins	+				+			
2	x, e, p, l, q, r, ins	+				+'			
3	m	+				-			

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supraj kontribuoj reaperos en iom simpligita formo en la tiea linio 3.

#### 4.2.7. ‘N’-bazaj adjektivoj

Kalocsay & Waringhien (1980:388, 398–399) donas multnombrajn ekzemplojn de adjektivigoj de radikoj de la semantikaj kategorioj (x), (e), (p), (l), (t), (m), (q), (r) kaj (ins), ekzemple: (x) *reĝ-* > *reĝa*, (p) *muzik-* > *muzika*, (x) *koton-* > *kotona* kaj multajn aliajn (x)- kaj (p)-kategoriajn. Ekzemploj de alikategoriaj radikoj estas facile aldoneblaj el NPIV: (e) *pluv-* > *pluva*, (l) *lok-* > *loka*, (t) *jar-* > *jara*, (m) *manier-* > *maniera*, (q) *nombr-* > *nombra*, (r) *motiv-* > *senmotiva*<sup>32</sup> kaj (ins) *maŝin-* > *maŝina*. La vortsignifo obeas la ĝeneraligitan egalajon Adj = Prep N, en kiu N estas la substantivigo laŭ 4.2.5 kaj Prep estas semantike kondiĉita prepozicio. La prepozicia sintagmo Prep N agas kiel modifanto en adjektiva pozicio de iu kapa substantivo N<sub>K</sub>.

Por determini la signifon de la individuaj adjektivigoj ni disponas pri du opcioj. La unua baziĝas sur la semantika funkcio Asocia (As, *Associative*), kiu agas inter N<sub>K</sub> kaj ties modifanto Prep N. La Asocia funkcio karakterizas multajn okazojn de fremdigebla posedo kun Prep = *de* (*patra aŭtoritato* = *aŭtoritato de la patro*) aŭ de modifantoj en la formo de prepoziciaj sintagmoj regeblaj de multaj aliaj kandidataj prepozicioj (*trajna vojaĝo* = *vojaĝo en trajno*). La dua opcio reprezentas okazojn de nefremdigebla posedo, en kiuj la posedanto estas priskribata kiel interna argumento de la posedato (*patra mano* = *mano de la patro*). Ĉi-okaze rolas la semantika funkcio Referenca (Ref, *Reference*) inter la nuklea substantivo kaj ties dependanto. La opcio de la semantika funkcio kaj la relativa libereco en la elekto de Prep en Prep N kaŭzas certan nivelon de subdeterminiteco de la solvo. Kiel ĝeneraligitan

<sup>32</sup>Multaj (m)-, (q)- kaj (r)-kategoriaj radikoj pli facile adjektiviĝas kun ia kvalifiko, ekzemple kiel *ĝentilmaniera*, *multnombra* kaj *bonmotiva*. Sen tia specifigo ilia modifanta rolo restus semantike ege subdeterminita.

signifospecifigon ni bezonas la paron As/Ref, el kiu elektendas unu kiu kune kun la radiksignifo donu la celatan vortsignifon.

En tabelo 11 la simbolo ++ sur la kruciĝo de la linio kun la kategorioj (x) k.t.p., kaj la vortkolumno Adj markas la aplikeblon de unu el la rilatoj de la kolumno As/Ref al la rezulta Adj, aldone al la radiksignifo.

Tabelo 11. La semantika aspekto de la adjektivigo de (x, e, p, l, t, m, q, r, ins)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
x, e, p, l, t, m, q, r, ins	+			+			++	

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 3.

#### 4.2.8. ‘N’-bazaj adverboj

Manieraj adverboj estas tiuj kiuj respondas al demando enkondukita per *kiel?*. Adverbigitaj (x)-kategoriaj radikoj estas efektive parafrazeblaj per sintagmo kiu esprimas la respondon *kiel N!* aŭ *laŭ N!* (kun N laŭ 4.2.5), ekzemple *hom-* > *home* = *kiel homo*, *infan-* > *infane* = *kiel infano*. Ĉar *kiel* ofte informiĝas pri konduto, ĝi facile aplikiĝas al vivaj estaĵoj, sed ne pro tio ekskludas senvivajn. En la esprimo *la nemovebla aŭto tanke baras la vojon* la adverbigita (x) *tank-* estas tute laŭgramatika kaj signifanta ‘kiel tanko’, pli-malpli ‘peze, fortimige obstakle’; simile (e) *spektakl-* en *tio efikas spektakle*, t.e. ‘kiel spektaklo’, pli-malpli ‘grandioze’; kaj (p) *koncept-* en *koncepte tio provizore sufiĉas*, t.e. ‘kiel koncepto’, pli-malpli ‘malnete, skize’.

Ankaŭ radikoj de la aliaj sendependaj kategorioj (l), (t), (m), (q), (r) kaj (ins) povas aplikiĝi en manieradverba pozicio kaj tiel efiki modife sur la nivelo de la predikata sintagmo, kvankam ne ĉiuj semantikaj kategorioj same facile allasas tian adverbigon. En la esprimo *mia ĝardeno estas kampe vasta*, la adverbo *kampe* < (l) *kamp-* egalas al *kiel kampo* (‘tre’). En *la vintro kondukas somere*, la adverbo *somere* < (t) *somer-* egalas al *kiel somero* (‘varme’). Radikoj (m)-kategoriaj laŭnature kvalifikiĝas por maniera adverbigigo, sed kutime ili esprimus semantike malplenan manierecon kiu bezonas ian enhavan specifigon, ekzemple ne *maniere*, sed *tiamaniere* = *laŭ tia maniero*, *ĝentilmaniere* = *laŭ ĝentila maniero* k.t.p. Ankaŭ la adverbigigo de (q)-kategoria radiko kiel *kvant-* en *kvante prijuĝi ion* (kontraŭ *kvalite*) estas interpretebla kiel ‘laŭ (la) kvanto’. La (r)-kategoria radiko *motiv-* povas adverbiĝi (kun specifigo) en *protesti senmotive* kaj la (ins)-kategoria radiko

*martel-* kiel *martele* en *la decido efikis martele*, t.e. *kiel martelo* (‘dure, frakase’).

Resume, la maniera adverbigo de radikoj de ĉiuj kategorioj povas obei la funkcie pravigeblan egalaĵon  $MAdv = kiel/laŭ N$ , kio implicas la nebezoon de plia signifospecifigo.

En tabelo 12 la simbolo + sur la kruciĝo de la linio kun la kategorioj (x) k.t.p., kaj la vortkolumno MAdv markas la aplikeblon de la radiksignifo al la rezulta MAdv. Restas notinde ke multaj (l)-, (t)-, (q)-, (r)- kaj (ins)-kategoriaj radikoj montras la tendencon adverbigi (per la sama finaĵo -e) kiel nemanieraj adverboj sur la fraza nivelo kaj kun vortsignifo kiu estas kongrua kun la semantika radiksignifo.

Tabelo 12. La semantika aspekto de la adverbigo de (x, e, p, l, t, m, q, r, ins)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
x, e, p, l, t, m, q, r, ins	+							+

En tabelo 17 (ĉapitro 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 3.

#### 4.2.9. ‘Adj’-bazaj adjektivoj

Pro sia pretendata adjektiveco, ĉiuj ‘Adj’-bazaj radikoj estas facile troveblaj en la semantika kategorio de la dependaj proprajoj (f). La vortsignifoj de tiaj ‘Adj’-bazaj adjektivoj estas rekte derivitaj de la nacilingvaj tradukoj de la koncernaj radikoj kiel adjektivoj, sen plia signifospecifigo. Ekzemploj estas *alt-* > *alta* modifanta (x) en *alta domo*; *jun-* > *juna* modifanta (x) en *juna kato*; *long-* > *longa* modifanta (e) en *longa spektaklo*; *serioz-* > *serioza* modifanta (p) en *serioza ideo*; *vast-* > *vasta* modifanta (l) en *vasta kampo*; *nov-* > *nova* modifanta (t) en *nova jaro*; *agrabl-* > *agrabla* modifanta (m) en *agrabla maniero*; *grand-* > *granda* modifanta (q) en *granda kvanto*; *valid-* > *valida* modifanta (r) en *valida motivo*; kaj *fajn-* > *fajna* modifanta (ins) en *fajna broso*.

En tabelo 13 la simbolo + sur la kruciĝo de la (f)-linio kaj la vortkolumno Adj markas la aplikeblon de la radiksignifo al la rezulta Adj.



Tabelo 13. La semantika aspekto de la adjektivigo de (f)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
f	+						+	

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 1.

#### 4.2.10. ‘Adj’-bazaj verboj

Kalocsay & Waringhien (1980:402–406) ellaboris tutan aron da skemoj kun multaj detalaĵaj atribuoj de signifoj al verboj de ‘Adj’-bazaj (t.e. (f)-kategoriaj) radikoj. Tamen ĉiuj montriĝas iel redukteblaj al la funkcie pravigebla parafrazo  $V = \text{Kop Adj}$ , t.e. *beli* egalas al la esprimo *esti bela* k.t.p., sen plia signifospecifigo. El la multaj ekzemploj de Kalocsay & Waringhien mi citas (apogante min sur vortsignifoj troveblaj en NPIV) *aktiv-* > *aktivi* = *esti aktiva*; *avar-* > *avari* = *esti avara*; *gaj-* > *gaji* = *esti gaja*; *grav-* > *gravi* = *esti grava*; *kapabl-* > *kapabli* = *esti kapabla*. La rezervo *iel*, kiun mi supre enmetis, koncernas la fakton ke multajn verbojn de (f)-kategoriaj radikoj povas karakterizi ia dinamiko aŭ limigita aŭ speciala uzokampo aŭ registro kompare kun la pli normala parafrazo kun la kopulo *esti*. Tio, tamen, ne subfosas la principan aplikeblon de la parafrazo, ĉar ne temas pri nepra antaŭkondiĉo por uzi la rektan verbigon de la radiko kaj krome tiaj nuancoj ne estas sisteme demonstreblaj en la nuntempa lingvouzo.

En tabelo 14 la simbolo + sur la kruciĝo la (f)-linio kaj la vortkolumno V markas la aplikeblon de la radiksignifo al la rezulta V.

Tabelo 14. La semantika aspekto de la verbigo de (f)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
f	+						+	

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 1.

#### 4.2.11. ‘Adj’-bazaj substantivoj

Kalocsay & Waringhien (1980:389) konceptas substantivojn kiel *belo* kaj *bono* kiel “abstraktajn entojn”. Similan difinon ni retrovas en NPIV (2002:148,

165). Tie ĉi proponas sin okulfrapa paralelaĵo kun la substantivigo de ‘V’-bazaj radikoj (subsekcio 4.2.2): ja ekzistas specialaj deriviloj por krei el (f)-kategoria radiko Individuaĵon aŭ Propraĵon, sed mankas al ni specifa instrumento por krei Abstraktaĵon. Aplikante *-ul* al *bon-* ni kreas (x) *bon·ul-*, el kiu sekvas *bonulo*; aplikante *-aĵ* ni kreas (x) *bon·aĵ-*, el kiu sekvas *bonaĵo*; kaj per *-ec* ni kreas (f) *bon·ec-*, el kiu sekvas *boneco*. Tiu ĉi lasta estas la substantivigo de stamo de la dependa kategorio (f), ĉar *bon·ec-* necese rilatas al iu aŭ io. Sed mankas al ni forme rekonebla sufikso por derivi mensaĵon aŭ abstraktaĵon el *bon-*. Sekvante PAG kaj NPIV, ni povas dedukti tiun rolon el la rekta substantivigo, t.e. el la manko de videbla sufikso aŭ ĉeesto de nula sufikso. Tiel *bon·0-*, kiu substantiviĝas kiel *bon·0-o = bono*, proponas sin por esprimi la Abstraktaĵon (p).<sup>33</sup>

Komplikaĵo estas ke (tro) rigora apliko de la Principoj de Neceso kaj Sufiĉo povas rezultigi vortigojn kiel *bono*, per kiu la aŭtoro ne celas la Abstraktaĵon, sed elipse, ŝparante sufikson, ekzemple la konkretan *bonaĵo* aŭ ies karakterize atribueblan *boneco*. Resume, la ‘Adj’-bazaj substantivoj estas subdeterminitaj koncerne sian vortsignifon, kiu estas ĉerpebla el iu el pluraj forme esprimeblaj, sed ne ĉiam esprimitaj sufiksoj aŭ el la konscia uzo de nula sufikso por esprimi Abstraktaĵon. Por la laste menciita apliko ni bezonas la signifospecifigon (p).

En tabelo 15 la simbolo ++ sur la kruciĝo de la (f)-linio kaj la vortkolumno N markas la aplikeblon de (p) al la rezulta N, aldone al la radiksignifo.

Tabelo 15. La semantika aspekto de la substantivigo de (f)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
f	+	+				++		

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 1.

#### 4.2.12. ‘Adj’-bazaj adverboj

Regulo 7 de la Fundamenta Gramatiko preskribas la uzon de ‘Adj’-bazaj radikoj tiel same en adjektivoj kiel en adverboj. La adverbigo do simple signifas ‘Adj-maniere’ kaj ne postulas apartan signifospecifigon. Trarigardo de ĉiuj ekzemplaj radikoj uzitaj en subsekcio 4.2.9 kaj kontrolitaj en NPIV konfirmas tiun uzon: *jun-* > *june* modifanta (<sup>1</sup>f) en *june konduti*; *alt-* > *alte* modifanta (<sup>2</sup>f) en *alte taksi (iun)*; *rapid-* > *rapide* modifanta (<sup>3</sup>f) en *rapide doni (ion al iu)*.

<sup>33</sup>Konfirmas tion la priskribo en NPIV (2002:165).

En tabelo 16 la simbolo + sur la kruciĝo de la (f)-linio kaj la vortkolumno MAdv markas la aplikeblon de la radiksignifo al la rezulta MAdv.

Tabelo 16. La semantika aspekto de la adverbigo de (f)-radikoj

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
f	+							+

En tabelo 17 (sekcio 4.3) la ĉi-supra kontribuo reaperos en la tiea linio 1.

### 4.3. Rezultoj

Reprenante la postulatan komponeblecon de la diversaj signifokontribuoj difinitaj en la subsekcioj 4.2.1 ĝis 4.2.12, ni povas stakigi la tabelojn 5 ĝis 16 unu sur la alian, bazante nin ekskluzive sur la maldekstre menciitaj semantikaj kategorioj, reordigitaj laŭ la sinsekvo de dependaj al sendependaj kategorioj. Tiel kreiĝas la malsupre enmetita tabelo 17, kiu resumas la semantikajn aspektojn de la vortigo de radikoj en esperanto.

Kiam en iu ĉelo de la vortkolumnoj V, N, Adj aŭ MAdv en tabelo 17 aperas nur unu simbolo +, tiam la signifo de la vorto estas tiu de la radiko.

En la ĉeloj en kiuj aperas akumuligo de du simboloj ++, la vortsignifo estas komponaĵo de la koncernaj du signiferoj, aktivigitaj de la sintaksa rolo de la vorto. La fina interpreto estas ofte formulebla per iu konvena kaj ĝenerale valida parafrazo kiel V = Kop Adj por (f)-kategoriaj verboj (vidu pli detale la koncernajn subsekciojn 4.2.1–4.2.12).


Tabelo 17. Semantikaj aspektoj de la vortigo de radikoj en esperanto

Radiko		Signifospecifigo			Vorto			
Kategorio	Radiksignifo	p	Akt/Pas + Prf/Imp/Prd	As/Ref	V	N	Adj	MAdv
1	f	+	+		+	++	+	+
2	<sup>1</sup> f, <sup>2</sup> f, <sup>3</sup> f	+	+	+	+	++	++	++
3	x, e, p, l, t, m (V?), q, r, ins	+		+	+, +'	+	++	+

Se ni provizore pretervidas el subsekcio 4.2.6 la kromsignifajn verbojn (ĉi tie markitajn per '+' en la koncerna ĉelo) kaj la ŝajne entutan reziston de radikoj

de la malofta kategorio (m) kontraŭ verbigo (ĉi tie markitan per (V?) en la kategoriokolumno), tabelo 17 kondukas nin al du konkludoj.

Unue, vortoj de ĉiuj klasoj estas formeblaj el radikoj de ĉiuj semantikaj kategorioj; due, la vortigo de la radikoj estas regata de limigita ensemblo de ĝenerale validaj semantikaj reguloj kiuj plispecifigas — kune kun la baza radiksignifo — la signifon de la vortoj. Elektante nombron da ekzemplaj radikoj arbitre, mi provis demonstri implicite ke iu ajn vortklaso estas malfermita al iu ajn radiko de iu ajn semantika kategorio. La sumo de tiuj ĉi konkludoj signifas ke ni povas difini la parolpartan sistemon de esperanto plene fleksebla sur la radikonivelo. En tiu ĉi sistemo, la vortoj, apartenantaj al la konata kvar-membra sistemo de sintakse uzeblaj verboj, substantivoj, adjektivoj kaj manieraj adverboj estas strukturitaj laŭ figuro 2 (malsupre), kiun mi proponas kiel anstataŭaĵon de figuro 1 (paĝo 18), kaj kiu, kontraŭe al figuro 1, nete distingas inter la semantika kaj sintaksa analizonivelejo de la lingvo.



Figuro 2. La esperanta vortstrukturo en fleksebla parolparta sistemo

La parolparta sistemo de esperanto montriĝas fleksebla (alivorte, senkategoria laŭ la tradicia esperantologia terminologio), se ni esceptas la subklason de radikoj el la kategorioj (x), (e), (p), (l), (q) kaj (r) kaj praktike la tutan kategorion (ins), markitajn en tabelo 17 per la simbolo +'.<sup>34</sup> Por ke la verbigo de elementoj el tiu subklaso estu komprenata, necesas la aldono de bunta kolekto da signiferoj, nek apartenantaj al la ĝeneraligitaj signifospecifigoj de tabelo 17, nek deriveblaj el la funkcia apliko de la vortigita radiko. Tiu efiko ne estas registrebla ĉe ilia substantivigo, adjektivigo aŭ adverbigo. La esceptita

<sup>34</sup>Rememorante, krome, la necertecon pri la teorie ebla, sed praktike malfacile trovebla verbigo de (m)-radikoj kaj la malfacilan troveblon de (t)-radikoj en vortigoj kun semantike sendependaj kromsigniferoj.

subklaso, do, koncernas radikaron kun verba kontraŭ neverba specialiĝo (vidu la duan linion en tabelo 3), kiu aldoniĝas al la cetera, fleksebla radikaro. Sekve, mi proponas klasifiki la nuntempan parolpartan sistemon de esperanto miksita unu-du-membra aŭ (1+2)-membra sur la leksema aŭ radika nivelo.<sup>35</sup>

Tabelo 18 (malsupre) donas kelkajn ekzemplajn radikojn kun iliaj vortigoj laŭ la (1+2)-membra sistemo:

*Tabelo 18.* Ekzemploj de flekseblaj radikoj kaj de verba-neverba radikparo en esperanto

	Tipo 1: Fleksebla			Tipo 2: V-NeV	
Radiko	skrib-	patr-	bel-	akv <sub>V</sub> -	akv <sub>NeV</sub> -
V	skribi	patri	beli	akvi	
N	skribo	patro	belo		akvo
Adj	skriba	patra	bela		akva
MAdv	skribe	patre	bele		akve

La solaj atendeblaj limigoj starigitaj al la vortigo de radikoj koncernas ilian semantikan akcepteblecon en la serĉata sintaksa apliko. Ekzemple, Individu-aĵo (x) kiel *reĝ-* simple havas malpli grandan ŝancon manifestiĝi verbe ol substantive.<sup>36</sup> Tamen, se mi volus profiti la rimon de *reĝ* kun *leĝ* kaj iom petole proponi la maksimumon *Reĝo reĝas, sed leĝo leĝas*, tiu ĉi dufoja apudmeto de substantivoj kaj verboj kreitaj el (x)-radikoj (fortaj N-kandidatoj) estus gramatike senriproĉa kaj ĉiu perfekte komprenus la celatan sencon.

## 5. Konkludoj

Verŝajne ni neniam ekscios kion precize Zamenhof imagis, kiam li kreis la parolpartan sistemon de esperanto. Certe li ne konis iun modernan lingvon kun unu-membra aŭ du-membra sistemo laŭ la difino de tabelo 3, kiun li estus povinta preni kiel modelon por sia projektata lingvo.<sup>37</sup> Tio kion ni ja povas

<sup>35</sup>Tiun ĉi sistemon oni ne konfuzu kun la (1/2)-membra sistemo priskribita en Hengeveld k.a. (2004:538). Ankaŭ tiu ĉi estas esence unu-membra, sed ĝi enhavas subsistemon de derivitaj stamoj, kiuj estas je unu ŝtupo malpli flekseblaj ol la radikoj en la lingvo.

<sup>36</sup>Szerdahelyi (1976:4, 9) nomis la formon kun la statistike rivelebla plej alta ŝanco de vortiĝo *primara (vort)formo*. Laŭ tiu difino 'reĝo' estus la primara vorto de la radiko (x) 'reĝ-', tiu kiu estas deduktebla el la nacilingvaj tradukoj en la vortaroj de UL kaj FdE. Kalocsay & Waringhien (1980:§ 88) kaj Kiselman (1991:96) nomas tian vorton *primitiva*.

<sup>37</sup>Laŭ Hengeveld k.a. (2004:549) reprezentantoj de tiuj lingvoj estas la samoa (aŭstronezia lingvo kun unu-membra parolparta sistemo, parolata en la Samoaj Insuloj en la Pacifika Oceano); la mundara (sudazia lingvo kun miksita unu-du-membra sistemo, parolata en orienta Barato); kaj la keĉua (lingvo kun du-membra parolparta sistemo, apartenanta al la keĉua lingvofamilio kaj parolata en Suda Ameriko).

establi surbaze de la plej fruaj verkoj aperintaj en kaj pri esperanto estas ke la parolparta sistemo tia kia ĝi aperis en 1887, nek refutis ĝian klasifikon kiel unu-membran (senkategorian) sistemon, nek baris ĝian pluan evoluadon en tiu senco. Verdire, la rigora dispartigo inter la semantika kaj sintaksa markadoj ene de vorto, t.e. inter la radiko kaj la roldifina finaĵo, estus povinta favori la establiĝon de unu-membra sistemo, eĉ se la Zamenhofa lingvoskizo kun sia ne tre scienca terminologio lasis multon al la bonvola malkovro de siaj legantoj.

Sendube la naskiĝanta parolkomunumo facile interpretis la parolpartojn kiel sintakse specialigintajn aŭ kategoriajn. Kaŭzis tion, krom la manko de detaloj en la disponeblaj lernolibroj, la prezentado de la esperantaj radikoj kiel sintakse pretaj vortoj en la naciaj tradukoj kiuj cirkulis tiutempe, kaj la cirkonstanco ke la grandega plejmulto de la pioniraj lernantoj de esperanto estis denaskaj parolantoj de eŭropaj lingvoj kun leksemnivele tri-membra parolpartaj sistemoj. Kontraŭ la kategorieco de la radikoj pledis dekomence la nepretervidebla preteco uzi ne nur primarajn, sed ankaŭ neprimarajn vortformojn, kiel faris Zamenhof mem (originale, didaktike) i.a. en FdE kaj Grabowski (traduke, literature) jam en Puŝkin (1987 [1888]). Ĉe ambaŭ aŭtoroj ni renkontas tiel radikojn ŝajne senkategoriajn kiel ankaŭ aliajn, specialigintajn laŭ la verba-neverba dikotomeco: (x) *sign-* > *signi* kun la signifo ‘esti kiel signo’ kontraŭ (x) *nom-* > *nomis* kun la signifo ‘donis nomon’ kun la sendependa kromsignifero *don* (Zamenhof 1963 [1905]:28, 99); (f) *rapid-* > *rapidu* kun la signifo ‘estu rapida’ kontraŭ (x) *form-* > *formi* kun la signifo ‘doni formon’ kun la sendependa kromsignifero *don* (Puŝkin 1987 [1888]:279, 276). En sia sola Lingva Respondo kiu estas rekte rilatigebla al nia problemaro, n-ro 4B de 1910, reproduktita en Zamenhof (1990:4), Zamenhof esprimas sin pli favora al la uzado de kopulo kun predikativa adjektivo *esti pia* ol la unuvorta *pii*, sed ne deklaras sin kontraŭa al tiu ĉi lasta alternativo. Mayer (2011:208) lokas la unuan sisteman uzadon de la tiel nomataj senpere verbigitaj adjektivoj kaj substantivoj jam en 1896 en la gramatikaj skizoj de Kofman kaj pravigas ĝin per la bezono je koncizo ĉefe en la poezio.<sup>38</sup> Ĉiu verbo citita de Mayer estas cetere parafrazebla per kopulo kun predikativa adjektivo aŭ substantivo kaj ne bezonas la aldonon de sendependaj kromsigniferoj. Ŝajnas nekontesteble ke la t.n. senpera verbigo eniris en la ĉiutagan lingvaĵon nur paŝon post paŝo kaj en la komenco ĉefe por anstataŭigi kopulan konstruon per pli konciza alternativo.

En 1930 Kálmán Kalocsay (kunaŭtoro de PG) verkis tekston por parolado dum la Oksforda UK, kies titolo estis *La evoluo de nia poezia lingvo*. Represaĵo de tiu teksto aperis en *Lingvo Stilo Formo* (Kalocsay 1970 [1931]:

<sup>38</sup>Mi dankas Katalin Kováts pro la rapida disponigo de la teksto de Mayer, kiu aperis dum la preparado de tiu ĉi artikolo.

49–76). En ĝi Kalocsay priparolas la esperantigon (en 1918) fare de Grabowski de la pola epopeo *Pan Tadeusz*, originale verkita de Adam Mickiewicz (1798–1855). Li forte laŭdas la tradukinton kaj nomas lin “La granda artisto de la fleksebleco, la kuraĝa tornisto de la poezia lingvo [...]” (Kalocsay 1970 [1931]:62). Li atribuas lian atingon al tuta serio da karakterizaĵoj, inter kiuj pintas la “Plej libera kaj kuraĝa verbigo de substantivoj” kaj la “Senpera verbigo de adjektivoj” (Kalocsay 1970 [1931]:63).

Pli ol duonan jarcenton poste Claude Piron esprimas sin simile panegire pri formoj de senpera verbigo kiel *flami*, *taksii*, *limaki*, *verdi* k.a.: “Kiu ŝatas uzi lingvon estetike aŭ arte, tiun ravas materialo tiel facile modlebla sen risiko ion ajn perdi el la komprenebleco.” kaj “La fakto konstante rilati kun eksterlandanoj fajngigas en la Esperanto-parolanto la senton pri tio, kion eblus nomi universala metaforo. Se oni esprimas la ideon ‘malrapide progresi’ per la elvoka vorto *limaki*, kiu estas nur la verba formo de *limako*, oni scias, ke Esperanto-uzantoj koreaj, ĉinaj, japanaj aŭ latinamerikaj komprenos la signifon.” (Piron 1992:6, 10). Rilate la signifan aspekton mi opinias ke Piron estis iom senzorga. Ni revenos al tiu ĉi punkto poste.

Laŭ Mayer (2011:209) la tiel nomataj senpere verbigitaj adjektivoj kaj substantivoj transiris de la poezia lingvaĵo en la ĉiutagan lingvaĵon de la junularo fine de la sesdekaj jaroj. Jam enkonduke en sia studo la aŭtoro mencias el sia propra sperto tiuepoka la ekzemplojn *piedis* (‘iris piede’), *basis* (‘veturis per (aŭto)buso’), *studentis* (‘estis studento’), kaj aliajn, el kiuj klare montriĝas ke iuj estas funkcie pravigeblaj per kopula parafrazo, aliaj postulas la aldonon de sendependa kromsignifero.<sup>39</sup> Mayer konfesas ke “kiam kaj kiel tiu eco de poezia lingvo fariĝis parto de la parolata, restas esplorenda”.

Resume, pri la evoluo ni povas diri ke mankas precizaj informoj pri la disvastiĝo de la fenomeno de la tiel nomata senpera verbigo, t.e. pri la demando kiuj individuaj radikoj komencis esti uzataj en tiu aŭ alia senkopula apliko, kiam tio okazis, kaj en kiuj cirkonstancoj (literatura lingvaĵo, junulara ĵargono, stabiliĝo kontraŭ efemereco k.t.p.). Ĉiuj indicoj supre menciitaj subtenas la impresionisman konkludon ke temas pri evoluo ekde preskaŭa neuzo en la komenco ĝis daŭra plimultiĝo de la nombro da partoprenantaj radikoj. Nur historia vortaro sur la bazo de grandskala tekstara esploro povos liveri la kvantajn informojn kiujn ni bezonas. Tio kio validas por la evoluo de la fenomeno same validas por la nuntempo, t.e., mankas precizaj informoj pri la aktuala aferstato.

Pri la substanco de la evoluo eblas diri jenon. Koncerne adjektivojn, ilia senpera verbigo ŝajnas esti kaptebla per la ĝenerala formulo laŭ kiu la rezulta verbo estas senescepte parafrazebla kiel la kopulo akompanata de la adjektivo en predikativa pozicio. Tiu ĉi verbigo do respondas al la postulo de FDG,

<sup>39</sup>La interkrampaj priskribaj tradukoj ne estas originalaj, sed deduktitaj el la kunteksto.

estas forme alloga kaj enhance akceptebla kaj, kadre de tiu ĉi studo, ne meritas pli da atento. Restas la t.n. senpera verbigo de substantivoj, kiun ni povas nun reformuli laŭ la terminologio de FDG kiel la verbigo de radiko de ajna sendependa semantika kategorio. En multaj okazoj tiuj verboj ne respondas al la postulo de FDG kiu preskribas la nuran atribumon de propraĵo sen aldono de sendependaj signiferoj. Ili ŝajnas esti modelitaj por imiti la senperan konverton (*zero conversion*), kiu troveblas en pluraj el la fontlingvoj de esperanto. El la angla ni citu la ĉi-kuntekste trafajn ekzemplojn *water* ‘akvo’ > *to water* ‘provizi akvon al tiu kiu ĝin bezonas’ kaj *hammer* ‘martelo’ > *to hammer* ‘frapi per martelo’. La kopiado de tiaj senperaj konvertoj (de substantivoj en verbojn) en esperanto per simpla anstataŭigo de la finaĵo kaj kreo de *akvi* kaj *marteli* sekvas tre tentan proceduron kiu kondukas al alloge koncizaj formoj. Sed en ambaŭ citaĵoj, la funkcia postulo ligita al *akvi* kaj *marteli* devus konduki al la simpla atribuo de *akveco* aŭ *marteleco* al iu referencaĵo. La kromaj signiferoj *proviz* respektive *frap* preteriras la funkciajn postulon kaj principe, pro sia neĝeneraligeblo, perturbas la sistemecon kaj travideblecon de la lingvo, kies lernfacileco ja multe profitas de antaŭdirebla rilato inter la semantiko kaj sintakso (Jansen 2011). En la tiel perturbita sistemo, ĉiu novkreita verbo ja devas esti lernata kaj parkerigata aparte: nome, laŭ la modelo de *akvo* ne funkcias la komparebla likvaĵo *lakto*, ĉar *lakti* ne signifas ‘provizi lakton’, sed ‘perdi lakton’. Kaj ĉu, laŭ la tezo de Piron, *benzini* estus uzebla por ‘provizi benzinon al mia aŭto’ “sen risiko ion ajn perdi el la komprenebleco”? En la nederlanda lingvo la senpera konverto de substantivoj (per aldono de la verba finaĵo *-en*) estas preskaŭ senlime produktiva procezo, sed la verbo *wateren* el la substantivo *water* ‘akvo’ havas kiel unu el siaj signifoj la ne tuj diveneblan ‘urini’, la verbo *melken* el la substantivo *melk* ‘lakto’ signifas nek ‘perdi lakton’ nek ‘provizi lakton’, sed ‘melki’, kaj la verbo *vloeren* el la substantivo *vloer* ‘planko’ signifas ‘ĵeti personon sur la plankon’, tute kontraŭe al la signifo de la esperanta *planki*, kiu estas ‘meti plankon sur grundon’ (NPIV 2002:882). Oni do ne havu la iluzion ke ĉiuj senperaj konvertoj estas tutmonde diveneblaj kaj kompreneblaj pro ia semantika universaleco kaj tial senplie akcepteblaj en esperanto.

Konklude, tipa ekzempla radiko kiel *dom-* estas uzata kiel svaga radiko,<sup>40</sup> kies diversaj vortigoj estas regataj de la signifospecifigoj de tabelo 17, dum *akv-* estas pli konvene priskribebla kiel splitiĝinta en la du heterosemajn *akv<sub>V-</sub>* (> ‘provizi la likvaĵon H<sub>2</sub>O’) kaj *akv<sub>NeV-</sub>* (> ‘la likvaĵo H<sub>2</sub>O’).<sup>41</sup> Krome

<sup>40</sup>Estus pli precize diri ke *dom-* estas difinita en NPIV (2002:251) kiel kvaropo de polisemaj radikoj sub unu kapradiko, kaj konsideri ĉiun el ili svaga. Kontraste kun homonimaj paroj, polisemaj radikoj estas forme identaj kaj semantike rilataj, ofte pro metafora signifvastigo el iu origino (Ravin & Leacock 2002:2).

<sup>41</sup>Mi uzas la terminon *heterosema* laŭ Lichtenberk (1991), kiu transprenis ĝin el Persson (1988). Tre valora fonto estas Enfield (2006), en kiu la ĉapitroj 2 kaj 3 estas aparte studindaj



ekzistas homonimaj (t.e. forme identaj, sed semantike senrilataj) paroj, kiuj pli-malpli spontane naskiĝis laŭ la dek-kvina regulo de FdE, ekzemple *park<sub>V</sub>-* (t.e. ‘parki veturilon’) kaj *park<sub>NeV</sub>-* (t.e. ‘publika ĝardeno’). La unua konsekvenco de tiaj perturboj estas ke la rolo de diversaj radikoj en la senafiksa vortformado fariĝas malpli klara: ĉu *akv-a* estu interpretenda kiel ‘*akv<sub>NeV</sub>-a*’ (t.e. ‘rilata al akvo’) aŭ kiel *akv<sub>V</sub>-a* (t.e. ‘akvumanta’)? Due, la derivado de novaj stamoj fariĝas malpli facile antaŭdirebla: ĉu *parkisto* estu interpretenda kiel ‘*park<sub>NeV</sub>-ist-o*’ t.e. ‘municipa ĝardenisto’ aŭ kiel ‘*park<sub>V</sub>-ist-o*’ t.e. ‘hotela deĵoranto kiu dismetas la aŭtomobilojn de la gastoj’? Estas evidente ke la kunteksto solvas multajn dilemojn, sed tio validas precipe por distingi polisemajn radikojn inter si. La estiĝo de heterosemaj radikoj kaj de homonimaj radikoj estas principe malpli facile solvebla de la kunteksto. Senbrida abundiĝo de radikaj heterosemeco kaj homonimeco ĝenos ne nur la vortigon de la nuraj radikoj, sed povos sentiĝi tra la tutaj derivada kaj kunmetada sistemoj, tiel perturbante ankaŭ tie la travideblon inter la semantiko kaj sintakso kaj pro tio la lernfacilecon de la lingvo.

Ekde sia PG de 1935, Kalocsay kaj Waringhien kaj iliaj posteuloj provis klarigi la uzadon de la parolpartoj kiel respeguliĝon de la tri-membra sistemo kiun ili kreis mismiksante la agosferojn de la sintakso kaj semantiko. Ĝis la hodiaŭa tago la tri-membra restas la plej aŭtoritata priskribo de la parolparta sistemo kaj bazo de la vortfarada sistemo entute. Dume, la lingvo pluevoluadas laŭ la kurso de la unu-du-membreco, kiun ĝi ekiris de la komenco kaj daŭrigis eĉ pli decide post la literatura ekflorado en la dudekaj jaroj.

Kiel alternativon por la tri-membra parolparta sistemo de esperanto mi el-laboris argumentadon favore al miksita unu-du-membra sistemo, en kiu plene flekseblaj parolpartoj kunvivas kun ŝajne kreskanta nombro da heterosemaj paroj de verbe-neverbe specialigintaj parolpartoj. La propono pri la unu-du-membreco inkludas la hipotezon (sed ne estas dependa de ĝi) ke la parolparta sistemo de esperanto estis origine interpretebla kiel unu-membra, fleksebla, senkategoria kaj ke ĝi estis evolupreta en tiu senco, sed ke reale ĝi evoluis al miksita unu-du-membra sistemo. Se tiel estus, la diakrona bildo de esperanto (verba specialiĝo de sektoroj de la parolparta sistemo, elirante el plene fleksebla sistemo) bele kongruus kun interlingve trovebla implica hierarkio de parolpartaj sistemoj, t.e. verba specialiĝo tuj sekvas plenan flekseblecon (vidu ankaŭ tabelon 3). Alivorte, se la unuaj uzantoj de esperanto, mem denaskaj parolantoj de lingvoj kun tri-membraj parolpartaj sistemoj, miskomprenis la eventualan unu-membrecon de la Zamenhofa projekto, almenaŭ ili puŝis la lingvon laŭ natura vojo.

## Bibliografio

- Aktoj de la Akademio 1963–1967*. 2007. Dua eldono. Roterdamo: Akademio de Esperanto.
- Auld, William. 1969. *Humoroj*. La Laguna de Tenerife: Stafeto.
- Dik, Simon C. 1997. *The Theory of Functional Grammar*. Berlino, Nov-Jorko: Mouton de Gruyter. Dua, reviziita eldono redaktita de Kees Hengeveld, en du volumoj.
- Duc Goninaz, Michel. 2009. Szerdahelyi kaj la ‘gramatika karaktero de la radikoj’. **En:** Koutny, Iona (red.), *Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al prof. István Szerdahelyi*, pp. 166–177. Poznań: ProDruk & Steleto.
- Enfield, Nick J. 2006. Heterosemy and the grammar-lexicon trade-off. **En:** Ameka, F.; Dench, A.; Evans, N. (red.), *Catching Language*, pp. 297–320. Berlino: Mouton de Gruyter.
- Hauptenthal, Reinhard. 2005. *Überlegungen zur Notwendigkeit eines Belegstellenwörterbuchs des Esperanto*. Saarbrücken: Iltis.
- Hengeveld, Kees; Rijkhoff, Jan; Siewierska, Anna. 2004. Parts-of-speech systems and word order. *Journal of Linguistics* **40**, 527–570.
- Hengeveld, Kees; Rijkhoff, Jan. 2005. Mundari as a flexible language. *Linguistic Typology* **9**, 406–429.
- Hengeveld, Kees; Mackenzie, Lachlan. 2008. *Functional discourse grammar. A typologically-based theory of language structure*. Oksfordo: Oxford University Press.
- Jansen, Wim. 2011. Esperanto: a language made transparent? **En:** Hengeveld, Kees (red.), *Transparency in Functional Discourse Grammar*. Amsterdamo: ACLC. Speciala kajero de volumo 4 en la serio *Linguistics in Amsterdam*.  
<http://linguisticsinamsterdam.nl/aclc/04/nr02/a03>.
- Kalocsay, K[álmán]. 1970 [1931]. *Lingvo Stilo Formo. Studoj*. Tria, parte tralaborita eldono. Oosaka: Librejo Pirato.
- Kalocsay, K[álmán]; Waringhien, G[aston]. 1935. *Plena gramatiko de Esperanto*. Buda-peŝto: Literatura Mondo.
- Kalocsay, K[álmán]; Waringhien, G[aston]. 1980. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. Kvara, tralaborita eldono, enhave identa al la kvina (lasta) de 1985, en kiu preseraroj de antaŭe estas korektitaj. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Kiselman, Christer O. 1991. Vortkreaĵ procezoj de Esperanto. *Scienca Revuo* **42**, 95–109.
- Leipzig Glossing Rules*. 2008. Retejo de la Lingvistika Departemento de la Instituto ‘Max Planck’ pri Evoluada Antropologio. Trovebla ĉe  
[www.eva.mpg.de/lingua/resources/glossing-rules.php](http://www.eva.mpg.de/lingua/resources/glossing-rules.php) (kontrolita 2012-10-08).
- Lichtenberk, Frantisek. 1991. Semantic change and heterosemy in grammaticalization. *Language* **67**(3), 475–509.
- Löwenstein, Anna. 2008. *Morto de artisto*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo.
- Lyons, John. 1977. *Semantics*. Kembriĝo: Cambridge University Press. En du volumoj.
- Mayer, Herbert. 2011. Diakrona evoluo: La senpera verbigo de adjektivoj kaj substantivoj. **En:** Hauptenthal, Reinhard (red.), *Instrui Dokumenti Organizati. Festlibro por la 80-jara naskiĝtago de Claude Gacond*, pp. 205–214. Saarbrücken: Iltis.
- Moerbeek, Rob. 2010. Redaktora artikolo. **En:** *NGGE sciigas* 29(86), pp. 1–4.
- La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. 2002. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

- Persson, Gunnar. 1988. *Homonymy, polysemy, and heterosemy: three types of lexical ambiguity in English*. Teksto de prelego antaŭ la Tria Internacia Simpozio pri Leksikografio, Universitato de Kopenhago: 1–16 majo 1986.
- Piron, Claude. 1992. *Esperanto el la Vidpunkto de Verkisto*. Vieno: Pro Esperanto.
- Puŝkin, Aleksandr. 1987 [1888]. *La neĝa blovado*. **En:** Ludovikito (red.), *Ludovikologiaj biografietoj*, pp. 273–293. Tokio: Ludovikito.
- Ragnarsson, Baldur. 1959. *Ŝtupoj sen nomo*. La Laguna de Tenerife: Stafeto.
- Ravin, Yael; Leacock, Claudia (red.). 2002. *Polysemy. Theoretical and Computational Approaches*. Oksfordo: Oxford University Press.
- de Saussure, René. 1916. La vort-strukturo en Esperanto. **En:** *Esperanto*, decembro (aldono), 3–20.
- de Saussure, René. 1969 [1911]. *Konkurso: Kia estas la logika senco de l' vorto 'grando'?* Saarbrücken: Iltis. Fotorepreso de la originala eldono de 1911.
- de Saussure, René. 1969 [1915]. *Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto*. Saarbrücken: Iltis. Fotorepreso de la originala eldono de 1915 (Bern).
- de Saussure, René. 1982 [1914]. *La vort-teorio en Esperanto*. Saarbrücken: Iltis. Fotorepreso de la originala eldono de 1914 (Genevo: UEL).
- Szerdahelyi, István. 1974. La bros-problemo. *Literatura Foiro* **28**, 16–19.
- Szerdahelyi, István. 1976. *vorto kaj vortelemento en esperanto*. Kuopio: Librofako de Literatura Foiro.
- Wennergren, Bertilo. 2005. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. El Cerrito, CA: ELNA. La libroeldono de la versio 14.0 de la interreta versio.
- Wennergren, Bertilo. 2010. *Detala Gramatiko de Esperanto*. Partizánske: E@I kaj ILEI.
- Zamenhof, L. L. 1968 [1887]. *Internationale Sprache*. Saarbrücken: Iltis. Fotorepreso de la originala eldono de 1887 (Varsovio: Kelter).
- Zamenhof, L. L. 1963 [1905]. *Fundamento de Esperanto*. Naŭa eldono, redaktita de André Albault. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj.
- Zamenhof, L. L. 1990. *iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof. kromkajero 8. lingvaj respondoj, konsiloj kaj opinioj*. Kioto: eldonejo ludovikito.

Wim Jansen estas aeronautika inĝeniero kaj magistro pri kompara lingvistiko kun specialiĝo pri la eŭska. Li doktoriĝis per disertacio pri la vortordo en esperanto kaj okupas ekde 2002 la specialan katedron pri interlingvistiko kaj esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo. Liaj ĉefaj verkoj estas la historie unua vortaro eŭska-nederlanda-eŭska kaj elementaj lernolibroj de la eŭska por la anglalingva merkato.

*Adreso:* Universiteit van Amsterdam, Capaciteitsgroep Taalwetenschap, Spuistraat 210, NL-1012VT Amsterdam.

*Retpoŝtaj adresoj:* [W.H.Jansen@uva.nl](mailto:W.H.Jansen@uva.nl), [wimjansen@casema.nl](mailto:wimjansen@casema.nl)

Ricevita 2011-08-28. Reviziita versio ricevita 2011-12-03.  
Aĉceptita por publikigo 2011-12-15